

revuo

esperanto

septembro 1967

60-a jaro

n-ro 742 (9)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



**KONGRESA
NUMERO**

ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

Raportoj pri la 52-a Universala Kongreso:

- 117 Ĉefartikoloj
- 118 Festparolado de la prezidanto de UEA
- 120 Solena Inaŭguro
- 121 Komitato de UEA, Laboraj Sekcioj, Ĝenerala Kunveno, Informaj Fakoj
- 122 Rezolucioj
- 123 Eksteraj eĥoj de la Kongreso
- 124 Internacia Somera Universitato
- 125 Internacia Arta Teatro
- 126 Konkursoj
- 127 Distraj aranĝoj
- 128 Solena Fermo
- 129 Marĝenaj notoj
- 130 La Juna Vivo: 23-a IJK de TEJO
- 132 Mallonge
- 133 Nekrologoj; Ricevitaj eldonaĵoj
- 134 Magnetofona Servo; Esperanto en radio
- 135 Oficiala informilo n-ro 404
- 136 La internaciaj konkursoj 1967; Anoncetoj

kovrila bildo

Prof. Lapenna malfermas la kunsidojn de la Komitato de UEA dum la 52-a UK en Rotterdam

bildojn liveris

Schaart & Buyse, Rotterdam (kongresfotoj)

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Germarkenstr. 146, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

La kuraĝa decido tamen okazigi ĉi-jare Universalan Kongreson montriĝis prava. Ĉirkaŭ 700 el la 1265 aliĝintoj efektive veturis al Rotterdam, kaj ĉirkaŭ 700 foriris kontentaj pri siaj spertoj tie. Malgranda kongreso, jes — sed kun fizikaj kondiĉoj, etoso, labornivelo kaj efikeco unuarangaj.

La ideala kongresejo ebligis okazigi en unu sama konstruaĵo ĉiujn aranĝojn senescepte, dum la negranda nombro de kongresanoj kaj la diligento de spertaj deĵorantoj kune ebligis tre glatan funkciadon, al kiu povus rivali nur tiu de Tokio. La helpemo de lokaj aŭtoritatoj estis tute senrivala.

Tiu organiza glateco sendube estis parta kaŭzo de la trankvila kaj harmonia kunlaboro en ĉiuj kunsidoj estraraj, komitataj, sekciaj ktp. Nervoj ne estis grave incititaj. Eĉ la humide varman veteron oni toleris bonhumore.

Estraro reelektita

La jaro 1967 estis jaro de elektoj. Finiĝis la trijara oficperiodo 1964-67. La Komitato de UEA, grandparte elektita jam antaŭ la UK, voĉdonis unuanime por nova Estraro, kies

konsisto estas baze la sama, kiel antaŭe. Aperas unu nova nomo: d-ro Peter Zlatnar (Jugoslavio) eniras la Estraron anstataŭe al d-ro Albault, kiu fariĝis prezidanto de UFE kaj dediĉos sin de nun al la franca movado. Krome, s-ro Ulrich Lins (Germanujo) fariĝis reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA. (D-ro Tonkin, la ĝisnuna reprezentanto, dediĉos ĉiujn siajn fortojn al laboro interne de TEJO).

Du kriterioj de sukceso

Ĉiu Kongreso havas du aspektojn: internan kaj eksteran. Se juĝi laŭ internaj aspektoj — la etoso de solidareco, la stimulaĵoj, kiujn produktis la laborsekcioj, la kulturaj aranĝoj — la 52-a estis jam sukcesa. Sed rilate la eksteran efikon, kiun en la momento de verkado ankoraŭ ne eblas plene superrigardi, ĝi kredible superis ĉiujn lastjarajn; tion kredigas, ekzemple, la granda interesiĝo ĉe diplomatoj kaj la tuja tutmonda disvastiĝo de la ĉefa kongresa rezolucio.

La 52-a Universala Kongreso de Esperanto, (Tel Aviv)-Rotterdam, ne nur savis la kontinuecon de la Universalaj Kongresoj sed forĝis elstare firman eron en la ĉeno.

NOVA ESTRARO RIGARDAS ANTAŬEN

El tri multhoraj estraraj kunsidoj dum la Kongreso en Rotterdam, unu apartenis al la malnova Estraro, la aliaj al la nova. Sed ĉar, kiel dirite, apenaŭ ŝanĝiĝis la membroj de la Estraro, la diskutoj estis fakte tute unuecaj. Ĉeestis la prezidanto, vic-prezidantoj kaj ĝenerala sekretario, estraranoj Albault (parte), Jaumotte, Toczyski kaj Woessink, d-ro Tonkin kaj poste s-ro Lins por TEJO; krome la direktorino de la C.O., la redaktoro de "Esperanto" kaj parte la KKS.

Disdivido de laboro

Kvankam la homoj plejparte restis, iliaj taskoj estas iom redistribuitaj konforme al nova koncepto de la organiza strukturo. Prof. Lapenna (estrarano jam dum 30 el la 60 jaroj de la ekzisto de UEA) plue plenumos siajn laŭstatutajn taskojn kiel prezidanto, sed krome okupiĝos nur pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj. Ĉiujn ceterajn laborojn transprenos s-roj Wensing kaj Becker, respektive vic-prezidanto kaj ĝenerala sekretario, kun helpo de s-ro Jaumotte, kiu restas estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj. S-ro Carlén, vic-prezidanto, plue konsilos pri metodoj de informado. D-ro Zlatnar transprenas la respondecon pri kongresoj kaj konferencoj de s-ro Becker. La ceteraj estraranoj konservas la ĝisnunajn taskojn. S-roj Becker kaj Lins formas kun

d-ro Tonkin, ĝenerala sekretario de TEJO, apartan komisionon pri informado.

En la Centra Oficejo okazos reorganizo laŭ tri ĉefaj branĉoj: ĝenerala administrado (respondecas la direktorino), kulturaj agadoj (resp. d-ro Sadler, kiun la Estraro nomis vic-direktoro) kaj kongresoj (resp. la KKS).

Novaj decidoj

Jen koncize la ĉefaj rezultoj de la dum-kongresaj diskutoj de la nova Estraro:

La Estraro aŭdis kaj aprobis projektitajn rimedojn por sanigi la financojn de TEJO, kiu esperas baldaŭ reguligi la aperadon de "Kontaktto". Ĝi ankaŭ decidis prepari kontraktojn de kunlaboro kun kvar pliaj fakaj organizaĵoj, kiuj tion petis.

D-ro Zlatnar la Estraro nomis ekstera kunlaboranto pri konferencoj de la Konsulta Komisiono pri Lernejoj. Ĝi starigis novan servon de UEA, la Diapozitiva kaj Fota Servo, kiun prizorgos s-ro H. Melasniemi. Ĝi akceptis proponon, ke UEA estu la centra distribuanto por nun preparataj lerniloj por araboj.

Fine, pri Kongresoj: Hispanujo garantias enirvizon al kongresanoj el ĉiuj landoj por 1968. Por 1969 la Estraro konsideris invitojn de Ateno, Beograd kaj Helsinki, sed decidis fari definitivan elekton post pliaj esploroj.

Sinjoro Reprezentanto de la Nederlanda Registaro, Sinjoroj Reprezentantoj de Ambasadaj, sinjorinoj kaj sinjoroj,

Rotterdam interesis kaj altiris min ekde mia junaĝo, eble ĉefe pro Erasmo, la granda humanisto, kies pensoriĉa verkaro siatempe skuis la intelekton de Eŭropo...

Mia revo vidi Rotterdam realiĝis nur en 1947, kiam mi havis la okazon viziti ĝin por la unua fojo.

Vivece restis en mia rememoro la malgranda, modesta stacidomo, sur kiu ankoraŭ vidiĝis freŝaj postsignoj de ĵus faritaj provizoraj riparoj; la dezerta vakuo de la centro, la ruinoj de multaj iam pompaj domoj; kaj la fantoma malpleno de ĝia fama haveno — ĉio ĉi rezultoj de la milito, precipe de tiu tragika 14a de majo 1940, kiam la tuta potenco de la nazia aerarmeo ĵetis sin sur tiun ĉi pacaman kaj prosperan urbon, kaj verŝis sur ĝin, sen ia ajn antaŭa admono, fajron kaj ŝtalon de morto, detruo kaj mizero...

Post tio mi vizitis Rotterdam en tre multaj okazoj, en la lasta tempo eĉ 3-4 fojojn en sama jaro. Kaj ĉiufoje mi trovis en ĝi tiom da novaĵoj kaj rearanĝoj, ke ofte mi havis la impreson, ke mi venis en iun alian, tute nekonatan urbon...

Admirindaj atingoj

Unu el la plej lastaj atingoj, pri kiuj la Rotterdamanoj prave fieras, estas tiu ĉi belega koncertejo kaj kongrespalaco kun luksaj salonoj kaj perfektaj internaj instalaĵoj, en kiu ni nun kunvenas...

Sian regeneriĝon Rotterdam ŝuldas al la krea genio, al la laboremo kaj alte evoluinta spirito de civitaneco de sia loĝantaro, al kiu mi direktas, en la nomo de la kongreso, de ni ĉiuj, tutkoran gratulon pro la admirindaj atingoj kaj la plej varmajn bondezirojn por plua progresado kaj prospera estonteco...

I.

Gemeliĝo Tel Aviv-Rotterdam?

La evoluo de UEA inter 1955 kaj hodiaŭ klare montras, ke la siatempaj decidoj pri la ŝanĝoj en la Statuto kaj en diversaj regularoj, kiel ankaŭ la translokigo de la Asocia sidejo de Herongate al Rotterdam, estis saĝaj kaj utilaj...

La nova sistemo, kiu siatempe elvokis kelkajn kritikojn, montriĝis ĉiurilate multe pli efika ol la antaŭa kaj interalie ebligis, ke en tiu ĉi jaro ne estu interrompita la serio de niaj universalaj kongresoj. Aldone al la bonŝanco, ke De Doelen estis luebla, nur dank' al la fakto, ke UEA rajtis senpere organizi la Kongreson kaj ke la ĉefa parto de la administrado troviĝas en la Centra Oficejo, ni nun povas

kunveni en Rotterdam kaj havi ne ian surrogaton de kongreso, sed la kutiman, normalan jaran manifestacion kun programo eĉ pli ampleksa, ol estis antaŭvidite pli frue por Tel Aviv, kaj kun multe pli da aliĝintoj.

Ni esprimas tutkoran dankon al la LKK en Tel Aviv kaj al la tuta israela esperantistaro pro la granda preparlaboro, kiun ili sukcese plenumis por organizi relative malgrandan, sed elstare interesan Kongreson en Tel Aviv. Sed ni ankaŭ ne forgesu danki, same kore kaj varme, al la gvidaj organoj de UEA, precipe al la Centra Oficejo kaj al la multnombraj helpantoj en Rotterdam pro la unuaranga organizo de la 52-a en rekorda tempo de 8 semajnoj, kiam la malfeliĉaj cirkonstancoj devigis nin ŝanĝi la kongresan urbon (Aplaŭdo). Sinceran dankon meritas ankaŭ nia nederlanda Esperanto-Asocio pro la plena kaj senkondiĉa apogo donita al la rektaj organizantoj...

Por daŭre memorigi tiun ĉi iom eksterordinaran eventon mi sugestas al la lokaj societoj de Tel Aviv kaj de Rotterdam, ke ili entreprenu la necesajn paŝojn ĉe siaj respektivaj aŭtoritatoj por ĝemeliĝi la du urbojn per Esperanto (tondra aplaŭdo).

II.

Paralele, samtempe, pacience

La du fundamentaj celoj de UEA, nedisigblaj unu de la alia, estas disvastigi la Internacian Lingvon kaj krei aŭ antaŭenigi kondiĉojn por ĝia kiel eble plej vasta utiligado en la praktiko.

Al la du ĉefaj celoj respondas tuta aro da taskoj difinitaj...

La multnombro kaj varieco de la taskoj ne malofte kaŭzas iom da konfuzo kaj oni renkontas personojn, kiuj demandas sin mem kaj aliajn kio estas la plej grava... Efektive, nenio estas pli grava ol io alia, ĉar ĉio, absolute ĉio estas dependa de ĉio alia. Oni certe ne povas atendi la praktikajn aplikojn, se oni samtempe ne altigas la nombron de personoj parolantaj la lingvon; nek oni povas sukcese instruadi, nome instruadi al plenaj klasĉambroj, se oni ne altiras al la lernejoj kaj eksterlernejoj kursoj novajn gelernantojn per inteligenta informado; nek oni povas informadi la publikon pri kio ajn valora, se efektive nenio inda je mencio okazas. La sola eliro el tiu ŝajne ensorĉita cirklo estas konscie planita kaj konscience plenumata paralela, samtempa, pacienca agado en ĉiuj direktoj kaj sur ĉiuj niveloj, tiel ke unu ero apogu la alian kaj kune la bazajn celojn.

Apenaŭ necesas diri, ke en tiu tuta ampleksa kaj kompleksa laboro ne ĉio iras ĉiam glate. Ofte oni renkontas obstaklojn kaj malfacilaĵojn. Iuj taskoj estas pli facile plenumataj ol la aliaj; tutaj branĉoj kelkfoje postrestas pro

difinitaj kaŭzoj; sporade, apartaj eventoj, ekster la Asocio, postulas ĝian tujan specialan atenton.

En la nuna periodo, krom la problemoj kiujn devas solvi jen la Komitato jen la Estraro, tri demandoj elsaltas pro aktualeco kaj ili formas la ĉeftemojn de la tri sekcioj de la Kongreso...

(Sekvas klarigo de la taskoj de la Laboraj sekcioj, pri kiuj vidu p. 121, kaj mallonga prezento de la kultura programo de la UK.)

III.

Du sendependaj proponoj

Rilate la eksteran pozicion de la Internacia Lingvo du eventoj sendube superregas la scenojn: la transdono de la Propono al la Sekretariato de UN kaj la Skandinavia Iniciato ĉe Unesko.

Kiel konate, la 6-an de oktobro 1966 sepper-sona delegacio de UEA, aganta en la nomo de ĉiuj subskribintoj, oficiale transdonis al la anstataŭanto de la Ĝenerala Sekretario de UN la jam faman Proponon pri radikala solvo de la lingva problemo per la Internacia Lingvo Esperanto...

Ne temas nur pri ia pure abstrakta, akvumita formulo, rilatanta nur ĝenerale al la signifo de la lingva problemo, sed temas pri klara, firma kaj senkompromisa pledo por Esperanto kiel la sola racia, praktika kaj justa solvo. Temas, sekve, pri apogo de intelektaj elitoj kaj milionaj amasoj ĝuste por tiu konkreta solvo. Tio per si mem — eĉ se forestus ĉiuj aliaj kromatingoj — estas tia unuaklasa kultura evento, ke ĝi laŭ sia valoro egalas al tuta etapo en la longa historio de provoj, paŝoj kaj klopodoj funde venki la lingvan obstaklon al intergenta kaj internacia komprenigo....

La alia evento estas la Skandinavia Iniciato ĉe Unesko. Kvin ŝtatoj de tiu regiono — Danlando, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedujo — prezentis al la Ĝenerala Konferenco proponon, ke en la buĝeto por 1969/70 la Ĝenerala Direktoro antaŭvidu la necesajn financajn rimedojn por establi kompetentan komisionon, kies celo estos konsideri la sferojn, en kiuj ekzistas bezono por internacia lingvo, kaj esplori la eblecojn por kontentigi tiujn bezonojn.

Ĝis la nuna momento nek UN nek Unesko faris kian ajn definitivon decidon....

Tamen senkonsidere al la plua evoluo de la demando ĉe UN kaj ĉe Unesko, unu afero estas absolute certa:

La fakto, ke en la sama jaro du plene memstaraj, sendependaj proponoj — unu amasa surbaze de privata iniciato, la alia oficiala en la nomo de 5 ŝtatoj — estis prezentitaj al la du ĉefaj interŝtataj organizaĵoj, prezentas plian pruvon de nia tezo, ke la lingva problemo akriĝas ĉiam pli kaj pli, ricevante jam plej akutajn aspektojn de politikaj luktoj, en kelkaj

kazoj eĉ de sangaj bataloj, kaj ke en tiaj kondiĉoj la atento de informitaj kaj racie pensantaj homoj kaj sociaj grupoj ĉiam pli direktiĝas al la Internacia Lingvo, kies ŝancoj por ĝeneraliĝo tial ampleksiĝas kaj firmiĝas. (Aplaŭdego).

IV.

Nova iniciato en 1968

Nun ni troviĝas sur la sojlo de nova tutmonda entrepreno. En 1968 estos celebrata la 20-jara datreveno de la subskribo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, kun la celo antaŭenigi ĉie la progresivan, pli rapidan realigadon de ĝiaj principoj.

UEA akceptis la inviton de Unesko aktive kontribui al tiu celo.... CED decidis komenci la eldonadon de unuaranga, altkvalita revuo sub la titolo "La Monda Lingvo-Problemo".... La revuo pritraktos la problemon en ĉiuj ĝiaj ĉefaj aspektoj: pure lingvistika, ekonomia, psikologia, socia, politika kaj aliaj. La artikoloj kaj studoj estos verkitaj en la angla, franca, hispana, rusa kaj aliaj naciaj lingvoj laŭ la elekto de la aŭtoroj, sed ĉiam kun ampleksaj resumoj en la Internacia Lingvo. Ĝi estos unika en sia speco, kaj ĝin certe abonos multaj institutoj, fakultatoj, internaciaj kaj naciaj institucioj kaj instancoj. Por garantii regulan, seninterrompan eldonadon de la revuo necesis trovi la komencan kapitalon de minimume 20 000 guldenoj. Mi turnis min per persona letero al trideko da geamikoj en diversaj landoj, kaj mi povas informi vin kun granda ĝojo kaj plezuro, ke la reago estis absolute senprecedenca. Post nuraj kelkaj semajnoj estis kolektita preskaŭ la tuta bezonata sumo, nome precize 19 000 guldenoj (aplaŭdo).

La mankantajn 1 000 guldenojn mi certe havigos dum tiu ĉi Kongreso*. Ne sciante, ĉu la kontribuantoj permesas, ke iliaj nomoj estu menciitaj, mi prisilentas ilin, sed ne povas ne esprimi al ili en tiu ĉi solena momento, kiam ni inaŭguras la Kongreson, la plej koran kaj plej varman dankon pro tiu grandega helpo, kiu samtempe signifas imitindan ekzemplon kaj unu el la plej instigaj kuraĝigoj....

Tio, geamikoj, estas nia vojo, la vojo de Universala Esperanto-Asocio, nome de ĉiuj landaj kaj fakaj organizaĵoj, de ĉiuj organoj kaj instancoj, de la tuta membraro, de ni ĉiuj...

Sur tiu vojo la 52-a Universala Kongreso de Esperanto Tel-Aviv-Rotterdam marku pluan, novan mejloŝtonon, ĉe kiu ni haltu por momento ne por ripozi, sed por reliefigi la perspektivojn de promesoplena estonteco, por ke ili donu freŝan inspiron kaj novan instigon al nia komuna laboro por komuna idealo.

* La antaŭdiro plenumiĝis! — NdIR.

DIPLOMATOJ DE DEK SES LANDOJ

Bonvena freŝa vento mildigis la varmon kaj larĝe etendis la du grandajn standardojn ĉe la enirejo de De Doelen ĵaŭdon, la 3-an de aŭgusto, kiam pluraj centoj da kongresanoj kolektiĝis en la tre impona Granda Salono por la Solena Inaŭguro. Dum ili eniradis kaj prenis siajn lokojn, jam okazis aparte akcepto flanke de la Estraro por membroj de la Honora Komitato kaj por senprecedenca nombro da diplomatoj, kiuj reprezentis ĉe la Kongreso siajn registarojn.

La unuaj vortoj de la prezidanto de UEA, kiu malfermis la solenaĵon, estis publika saluto direktita al tiuj eminentaj gastoj laŭnome: al mag. Klaasesz, prefekto en la provinco Sud-Holando, al s-ro Oosting, reprezentanto de la ministro pri instruado kaj scienco, al la vic-urbestro s-ro de Vos, al la ambasadoroj de Israelo kaj Kanado kaj al diplomatoj de 14 aliaj landoj — Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Jugoslavio, Monako, Nov-Zelando, Pollando, Hispanujo kaj Svedujo.

Bonvenigante la kongresanojn (nederlandlingve, kun posta traduko de f-ino Vermaas), prefekto Klaasesz aldonis, ke li tamen preferus ne vidi nin en Rotterdam ĉi-jare, ĉar estus certe pli feliĉe, se ĉiuj povus troviĝi en Tel Aviv laŭ la plano. Li bedaŭris ne vidi multoble pli da kongresanoj, ĉar tion meritas Esperanto. Post nelonge li devos paroli antaŭ granda internacia kongreso de Ruĝa Kruco, ĉe kiu mankos rimedoj por samtempa interpreto. Kiom pli bone, se tia kongreso ankaŭ uzus Esperanton!

Prof. Lapenna, respondante, dankis pro tia klara kompreno de la lingva problemo kaj pro la aktiva helpo de nederlandaj aŭtoritatoj, kiu

ebligis organizi en tiel mallonga tempo de ok semajnoj Universalan Kongreson. Sed ni ne forgesu danki, li aldonis, ankaŭ la apogon ricevitan en Israelo de la tieaj aŭtoritatoj.

Al siavica bonvenigo de la vic-urbestro respondis vic-prezidanto Carlén. "La grandurbo Rotterdam akceptis nin, ne kiel militrifugintojn, sed kiel gastojn".

Viktimoj de cirkonstancoj

Ekparolis tiam la direktorino de la Centra Oficejo de UEA, nome de la kongresorganizantoj. Ni ĉiuj — precipe tiuj aliĝintoj, kiuj ne sukcesis veni — estas viktimoj de eksteraj cirkonstancoj. La financaj perdoj necesigis, ke iuj aranĝoj estu pli modestaj, ol kutime. Ali-flanke, la imponiga kongresejo mem estas pli ol sufiĉa kompenso. Pro la ekspresa organizo povas aperi iuj eraretoj. Sed dank'al aro da sindonaj helpantoj (precipe el la siatempa kongresurbo Hago), al subvencio de la urbo Rotterdam, kiu duone kovris la luprezon de la kongresejo, kaj al diversflanka senpaga helpo de la firma Zwagers, esti eble sukcese transplantita tutan kongreson de Tel Aviv al Rotterdam.

La parado de salutoj

Muzika interludo enkondukis la salutojn nome de registaroj: s-ro Jaumotte por la belga ministro pri publika instruado ("100% subtenanto de nia ideo"), s-ro Anjer por la norvega registaro kaj s-ro Söderberg por la sveda. Je tiu punkto prof. Lapenna transdonis la prezidon al s-ro Wensing, kaj viciĝis la tradiciaj salutoj unuminutaj (ĉi-jare efektive tiaj!) de landaj organizaĵoj: la argentina, aŭstralia, aŭstra, belga, brita, bulgara, dana, finna, franca (la plej malnova, 70-jara en 1968), germana, hispana (invitas al Madrid), hungara, itala, japana (prof. Oka, kiu enkondukas la terminon "minisaluto"), jugoslava, kanada, nederlanda, norvega, nov-zelanda, pola, sveda, svisa, urugvaja kaj usona — kaj ankoraŭ de la nealiĝintaj ĉeĥoslovaka, hinda kaj kolombia. La salutaron kompletigis skribaj bondeziroj de la ELNA-kongreso en St. Louis, de la Grupo de Monako, de HEI kaj de Miss Esperanto 1966.

Denove muzika kvarteto interpunkciis la programon kaj permesis spiropaŭzon antaŭ la festparolado de prof. Lapenna. Ekirante el personigita omaĝo al Rotterdam, la oratoro disvolvis la temon de organizita kaj ekvilibrita laboro en la Esperanto-movado antaŭ ol skizi la ĉefajn eventojn ĵusajn (Propono al UN kaj skandinavia iniciato ĉe Unesko) kaj venontan (Jaro de Homaj Rajtoj 1968). Tiun ĉi paroladon oni devas rigardi unu el la plej bele prezentitaj de la lastaj jaroj.

La dankoj de vic-prezidanto Wensing metis punkton al la Inaŭguro de la 52-a UK.

Prof. Lapenna malfermas la 52-an UK



Malgraŭ la mallonga prepar-periodo, kvardek kvin komitatanoj aŭ anstataŭantoj povis ĉeesti en Rotterdam la kvar kunsidojn de la Komitato de UEA, tiel ke — malofta evento! — oni povis tuj konstati kvorumon. Ekde tiu bonaŭgura komenco ĉio disvolviĝis senobstakle. La ĉeestantaj komitatanoj A (nomitaj de la asocioj aliĝintaj) kaj B (vidu jul-aŭg., p. 116) alektis 14 komitatanojn C: s-roj Bakker (filo), Becker, Dahl, Helmuth, Holmes, s-ino E. Lapenna, s-roj Lins, Maertens, Markarian, C. Minnaja, Osibov, Thierry, Wensing kaj Zlatnar. Tiel altiĝis ĝis 71 la nombro de komitatanoj entute.

En sia kompletigita konsisto la Komitato elektis unuanime la Estraron priskribitan sur p. 117, kiel kontrolantojn de la C.O. s-ron Maertens kaj d-ron Bormann kaj kiel kontrolantojn de CED s-rojn Diaz kaj Parker. Ĝi same unuanime elektis al la Honora Patrona Komitato ambasadoron Ralph Harry, prof. Miguel Sancho-Izquierdo kaj prof. Yrjö Väisälä. Biografiaj skizoj pri la novaj membroj de HPK aperos en venonta eldono de "Esperanto".

Dum la Kongreso laboris komitataj komisionoj pri la elektoj, pri financoj, pri lernejoj kaj pri la Laborplano. Kiel ĉiujare, la Komi-

tato ankaŭ diskutis kaj aprobis la kongresajn rezoluciojn, la buĝetojn de UEA kaj CED, la raporton de CED kaj la Estraran Raporton, en kiu ĝi tamen forstrekis la lastan alineon de ĉap. XIV (1), pri la verkoj de Kalocsay kaj Jung. En ligo kun tiu lasta decido la Komitato unuanime rekomendis al la Akademio solvi kiel eble plej baldaŭ la demandon ata/ita kaj al la Esperanta gazetaro ĉesigi la tiuteman diskuton.

Misprezentoj kondamnitaj

Aŭdinte raporton pri la proceso de UEA kontraŭ Hans Jakob, la Komitato unuanime esprimis plenan apogon al la agado de la Estraro, bazita sur la Statuto kaj la decidoj de la Komitato. Per ĉiuj voĉoj kun unu sindeteno ĝi plie kondamnis la misprezentojn aperintajn en "Heroldo de Esperanto", ekz. la leteron de E. Curtenaz en n-ro 1438 de 16 jul 67.

En aparta punkto de la tagordo, temanta pri la nuntempa ĝenerala situacio de Esperanto, la prezidanto precipe avertis pri la danĝero, kiun prezentas senrespondeca skribado en la Esperanta gazetaro mem, donante fortan armilon en la manojn de kontraŭuloj de Esperanto.

LABORKUNVENOJ DONIS UTILAJN IDEOJN

La Laboraj Sekcioj estas grava diskutejo por movadaj problemoj. En Rotterdam estis tri Sekcioj: pri fakoj kaj profesioj, pri instruado kaj pri turismo. Prezidis respektive prof. Lapenna, prof. Toczyski kaj s-ro Wensing. La bazajn raportojn prezentis s-ro Jaumotte (fakoj, turismo) kaj s-ro Becker (instruado). La nombro de ĉeestantoj variis inter 50 kaj 100.

Sekcio I, "Esperanto en fakoj kaj profesioj", detale konsideris la ĝisnunan plenumon de la koncernaj punktoj (14 kaj 27) de la Laborplano, rekomendis detaligi ilin per artikoloj en la gazetaro kaj precipe akcentis la neceson kvalite kaj kvante plibonigi la fakdelegitan reton de UEA.

Sekcio II, "Lerneja kaj eksterlerneja instruado de la Internacia Lingvo", same bazis sin sur la Laborplano. Ĝi akceptis fine 10 rekomendojn, i.a. pri la neceso krei novajn Esperanto-instruistojn inter la profesia instruistaro kaj pri la okazigo de tria Lerneja Konferenco en 1968 en Grésillon, Francujo.

Sekcio III, "Esperanto por turismo" akceptis unuanime rezolucion direktitan al UIOOT (Unuiĝo Internacia de Oficialaj Organizaĵoj Turismaj), pledantan por forigo de baroj administraj (ekz. vizoj, havenimpostoj, formalajoj) kaj lingvaj, ĉi-lastaj per instruado kaj apliko de Esperanto en turismaj instancoj.

En ĉiuj tri Sekcioj aperis aro da utilaj pli specifaj ideoj, kiujn nun konsideros la fakaj organizaĵoj kaj la Konsulta Komisiono pri

Lernejoj surbaze de la protokoloj. Entute tamen la sekcia laboro estus eble pli fruktodona, se ĝi konsistus el sistema diskuto pri klare difinitaj problemoj anstataŭ el sinsekvaj raportoj de diversaj fakoj aŭ landoj, kiel parte okazis en Rotterdam.

La Ĝenerala Kunveno de UEA, aliflanke, produktis pli laŭteman diskuton, ĉar ĝi prezentis, ĉapitron post ĉapitro, la Estraran Raporton pri 1966/67 al la ĉ. 150 ĉeestantoj. Prezidis s-ro Carlén, dum respondis nome de la Estraro la ĝenerala sekretario. Tie ĉi la diskutoj koncentriĝis je kongresoj, informado kaj lernejoj. En la dua parto de la kunveno la reprezentantoj de fakaj asocioj havis okazon raportbi pri siaj dumkongresaj laboroj.

Kunvenis la Informaj Fakoj

Vere fruktodona estis la kunveno de landaj Informaj Fakoj, sub prezido de s-ro Becker. Kvankam (aŭ eble ĉar) ĉeestis nur 20 personoj, utila interŝanĝo de spertoj kondukis al jenaj tre konkretaj konkludoj: Prezentigas eblecoj konsiderinde raciigi kaj ekspresigi la informadon pri Esperanto. Per ligo de la Informa Fakoj de UEA al tiu de UFE en Parizo devus esti ebla la senprokrasta diskonigo de novaĵoj sur monda skalo pere de la grandaj telegraf-agentoj en Parizo, dank' al profesiaj kontaktoj. Tio siavice ebligus al la landaj IF dediĉi pli da atento al landaj kaj lokaj novaĵoj.

"INTENCA PRISILENTADO" ĈE UN-SEKRETARIATO

Rezolucio 1

La 52-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Rotterdam, 2-9-a de Aŭgusto 1967,

AŬDINTE la raporton de la Estraro de U.E.A. pri la kontribuo de Universala Esperanto-Asocio al la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj pri la transdono de la Propono por la solvo de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj al la Sekretariato de UN la 6-an de Oktobro 1966;

PRENANTE en konsideron la decidon de la Komitato, per kiu ĝi unuanime aprobis la agadon de la Estraro, kiu en tiu ĉi kazo reprezentis ne nur la Asocion, sed ankaŭ ĉiujn subskribintojn;

AKCEPTIS en sia ferma kunsido per ĉiuj voĉoj jenan

REZOLUCION

1. La Kongreso konstatas kun kontento, ke la ampleksa speciala Laborplano de la Asocio okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro estis kontentige plenumita kaj ke, rezulte de tiu agado, minimume kvindek milionoj da personoj estis informitaj pri la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj pri la ĉefaj aspektoj de la laboro de UN. Ĝi dankas al la Estraro pro la organizo de tiu ĉi mondskala agado kaj al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj pro ilia kontribuo al tiu rimarkinda sukceso.

2. La Kongreso same tiel aprobas la decidon de la Komitato kaj de la Estraro, laŭ kiu la Asocio partoprenos per speciala programo en la celebrado de la 20-jara datreveno de la subskribo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.

3. La Kongreso esprimas dankon al la Estraro pro la laboro farita en ligo kun la Propono kaj al la delegacio de la Asocio, kiu transdonis ĝin al la Sekretariato de UN, kaj plene aprobas la sugestojn de la Prezidanto faritajn en pluraj leteroj al la Sekretariato de UN.

4. La Kongreso konsideras la neklarigitan rifuzon de la Sekretariato komuniki la Proponon al la Ŝtatoj-Membroj, aŭ meti ĝin en la tagordon de la Ĝenerala Asembleo, aŭ transdoni ĝin al Unesko, aŭ fari kiun ajn alian paŝon, kiel kontraŭan al la spirito de la Ĉarto kaj kiel maloportunan por la intereso kaj prestiĝo de UN. Ĝi opinias, ke la Sekretariato ne estas kompetenta decidi pri la sorto de Propono direktita ne al la Sekretariato mem, sed al UN.

5. La fakto, ke la Propono ne estas menciita en kiu ajn oficiala publikaĵo de UN povas esti interpretita nur kiel intenca prisilentado de ĉi tiu amaspropono, kiun subskribis preskaŭ unu miliono da unuopuloj — inter kiuj centoj da mondfamaj personoj kaj miloj da aliaj eminentaj publikaj funkciuloj kaj kulturaj agantoj — kaj kiun, krome, apogis preskaŭ kvar mil organizaĵoj kun ĉirkaŭ 73 milionoj da membroj. La Propono tial prezentiĝas kiel unika laŭ sia enhavo kaj plej granda laŭ la nombro de subskriboj iam ajn adresita en la kultura historio de la homaro al internacia instanco surbaze de privata iniciato.

6. La Kongreso esprimas sian firman konvinkon, ke unu el la fundamentaj Homaj Rajtoj, rekonita de ĉiuj civilizitaj nacioj, estas la rajto proponi/peticii, kio inkluzivas la rajton ricevi respondon. Ĝi tial esperas, ke en la Jaro de la Homaj Rajtoj la Sekretariato rekonsideros sian nekompreneblan starpunkton kaj entreprenos la necesajn paŝojn por doni normalan sekvon al la Propono prezentita la 6-an de Oktobro fare de Universala Esperanto-Asocio en la nomo de ĉiuj subskribintoj.

7. La Kongreso komisias la Estraron de la Asocio komuniki tiun ĉi rezolucion al la Ĝenerala Sekretario de UN, atente plue sekvi la evoluon de tiu ĉi afero kaj, se necese, informi la subskribintojn pri la ĝisnuna traktado de la Propono fare de la Sekretariato de UN.

Rezolucio 2

La 52-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Rotterdam la 2-9-a Aŭgusto esprimas sian konvinkon, ke la vastigo kaj profundigo de la amikaj rilatoj inter la nacioj kaj popoloj estas unu el la esencaj antaŭkondiĉoj por la monda paco kaj tial en la intereso de la tuta homaro kaj de ĉiu unuopa nacio. Ĝi altiras la atenton de ĉiuj respondecaj publikaj agantoj kaj de la vastaj popoltavoloj al la Internacia Lingvo Esperanto kiel potenca instrumento por atingi de tiu celo.

Rezolucio 3

La 52-a Universala Kongreso de Esperanto (Tel Aviv)-Rotterdam, 2-9 de Aŭgusto 1967,

KONSCIANTE pri la graveco de ĉiam pli ampleksiĝanta turisma trafiko, rekonita ankaŭ de UN per la proklamo de 1967 kiel "Jaro de Internacia Turismo";

(daŭrigo dekstre)

Kiel jam aludis la ĉefartikolo, la ĉi-jara Kongreso forte atentigis sin en la ekstera mondo. Se plaĉis al kelkaj memkontentaj ĵurnalistoj nederlandaj primoki ĉion, la registaroj de tre multaj landoj montris seriozan interesiĝon, ekde informpetoj ĝis ambasadora ĉeesto, kaj ankaŭ la pli granda parto de la gazetaro raportis pozitive.

El la diplomatoj ĉe la Inaŭguro, almenaŭ la dana kaj pola revizitis en aliaj tagoj, la germana aranĝis specialan akcepton kaj la hispana invitis nombron da personoj al aparta manĝo. La vic-urbestro de Rotterdam (la urbestro mem estis eksterlande) akceptis ĉiujn kongresanojn en la impona urbodomo per bonvenigaj vortoj (respondis prof. Lapenna) kaj regalaĵoj.

Rezolucio trakuris la mondon

La ĉefa sukceso rilate la gazetaron estis la tuja diskonigo de la Rezolucio 1, kiun distribuis la telegrafagentejoj AP kaj ANP. Ĝiaj ĉefaj punktoj aperis en la plej gravaj nederlandaj ĵurnaloj sub titoloj kiel "Protesto kontraŭ sinteno de UN-Sekretariato". La pariza "Le Figaro" (488 000 ekz.), kiu sendis al Rotterdam specialan korespondanton por la daŭro de la Kongreso, presis i.a. la esencajn punktojn de Rezolucioj 1 kaj 3. La titolo: "La esperantistoj komencos novan ofensivon kontraŭ ĉiu diskriminacio lingva kaj kultura". Bone aranĝita gazetara konferenco jam antaŭ la Kongreso instigis plurajn ĵurnalojn sendi raportojn, dum aliaj uzis la regulajn bultenojn de la Kongresa Gazetara Servo, kiun gvidis Marinko Gjivoje. Eksterlande efikis anticipaj bultenoj de IGS. La nederlanda radio intervjuis prof. Lapenna kaj s-ron Wensing, la germana s-ron Becker, kaj la nederlanda TV elsendis parton de la Inaŭguro (festparolado).



Ce la akcepto antaŭ la Inaŭguro: maldekstre L.E. la Ambasadoro de Kanado, s-ro Frederick Bull, kun la Ĝenerala Konsulo de Britujo, s-ro J. O. May. Ĉeestis i.a. ankaŭ la Ambasadoro de Israelo, d-ro Daniel Lewin.

Krom la komuniko de Rezolucio 1 al U Thant, la Kongreso ankaŭ telegrafis al la Monda Kongreso de Mondfederalistoj en Oslo sian apogon al propono de ties japana delegacio pri oficialigo de la Internacia Lingvo. Fine ni menciui, ke pli ol 500 eksterlandaj universitatoj kaj pli ol 200 nederlandaj profesoroj estis rekte informitaj pri la programo de la Internacia Somera Universitato.

LINGVA DISKRIMINACIO = KULTURA DISKRIMINACIO

(daŭrigo de maldekstre)

NOTAS, ke turismo reduktita al nura veturado sen reala kontakto kun la popoloj de la vizitataj landoj forte malriĉiĝas je kulturaj sekvoj, kiuj ja estas la plej gravaj kaj la plej atentataj de UN mem;

KONSTATAS, ke la nura kono de la propra nacia lingvo ĉe la vastaj homamasoj nun vojaĝantaj por turismaj celoj rekte konkretiĝas en lingva diskriminacio kontraŭ difinitaj nacioj kaj difinitaj popoltavoloj, kaj ke tiu diskriminacio necese etendiĝas al kultura diskriminacio;

NOTAS, ke tiu problemo neniel estis kontentige solvita per malnovaj metodoj konsistantaj el tute supraĵa lernado de fremdaj naciaj lingvoj;


ATENTIGAS ankoraŭfoje, ke la sola racia kaj justa maniero por doni al la turismo la necesan kulturan enhavon estas la ĝeneraligo de la praktika uzo de la Internacia Lingvo (Esperanto) plene funkcia jam plurajn jardekojn;

REKOMENDAS al UN kaj al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj konkrete apogi la disvastigon de Esperanto, precipe okaze de la Jaro de Internacia Turismo, atentante ankaŭ tiurilate la amasan Proponon de preskaŭ unu miliono da individuoj kaj 3851 organizaĵoj kun 73 milionoj da membroj, prezentitan la 6-an de oktobro 1966 al la Sekretariato por Unuiĝintaj Nacioj.

En Rotterdam, la 9-an de Aŭgusto 1967

La Kongresa Prezidantaro

esperanto
septembro 1967



D-ro Paul Neergaard,
Rektoro de la ISU

VARIA DUDEKA SESIO DE ISU

Mejloŝtonon pasis la Internacia Somera Universitato, kiu ĉi-jare atingis sian 20-an postmilitan sesion. En tiuj 20 jaroj prelegis entute 68 diversaj profesoroj kaj aliaj kvalifikitoj el dudeko da landoj. Malgraŭ la eventoj en Mez-Oriento, kiuj kaŭzis la nuligon de tri prelegoj antaŭe anoncitaj, la 20-a sesio povis ampleksi sep tre variajn temojn, inter kiuj ne mankis kelkaj ligitaj al Israelo. Ĉeestis de 50 ĝis 300 personoj.



Prelegas s-ino C. Conterno

Rektoro de ISU (jam la trian fojon) estis d-ro Paul Neergaard (Kopenhago), kiu ankaŭ prezidis la pli multajn prelegojn. En sia Inaŭgura Parolado li emfazis la urĝan bezonon kreskigi la sciencajn literaturon de Esperanto por alfluigi en la ĉiutagan lingvon la vivigan sangon de sciencaj terminoj. Decida paŝo estos la apero de Plena Ilustrita Vortaro, kies 3300-paĝa manuskripto kuŝas prespreta.

La Rektoro krome mem prelegis: pri "Teknika asistado al la evolulandoj", kiu, li opinias, estas ankoraŭ tute neadekvata fronte al la ĉiuspecaj problemoj de tiuj landoj, kie en la jaro 2000 vivos jam 80 % de la homaro. La temon li abunde ilustris per ekzemploj el sia propra sperto en Azio kaj Afriko. Kvazaŭ daŭrigo de ĉi tiu prelego prezentigis tiu de prof. Oton Pancer (Zagreb), "Raciigo de la laboro en agrikulturo kaj hortikulturo". La monda nutro-manko postulas racian organizon de la laboro, adapton de laboriloj kaj laborejoj al la homo. Tiaj rimedoj ofte povas pli efike altigi produktadon, ol kemiaĵoj kaj maŝinoj. Ambaŭ prelegantoj utiligis diapozitivojn.

Pri "Genocido" prelegis prof. Lapenna (Londono), kaj precipe pri la Konvencio pri Genocido, kiu havis sian originon en la procesoj de Nürnberg. Genocido signifas neadon de la ekzistorajto de homgrupo, simile kiel homicido rilate al homo individua. La preleganto pledis por tio, ke ankaŭ kultura genocido (ekz. per-

forta asimilo de popolo per subpremo de ĝia lingvo) estu rigardata internacia krimo.

Prof. J. Régulo-Pérez (La Laguna) donis en sia prelego "Kontribuo de la judoj al la formiĝo de la kanaria loĝantaro" resumon de la tuta Inkvizicia periodo de la 15-a ĝis la 19-a jarcento. Li montris, kiel en Kanarioj la fuĝintaj judoj asimiliĝis kun la antaŭa loĝantaro.

Medicinan temon prezentis d-ro A. Albault (Toulouse): "Kion oni sciu pri la operacio de katarakto". Post detala priskribo de anatomio, specoj de katarakto, kaŭzoj kaj indikoj por operacio li konkludis, ke denaskaj kataraktoj estas operacieblaj nur en la unua vivojaro, dum akiritaj kataraktoj ĉe maljunuloj estas plej facile kaj ŝancoplene trakteblaj.

La du lastaj prelegoj havis komuna la temon de lingvo. Prof. Clelia Conterno (Torino) anstataŭis lastmomente prof-on Djoudjeff per prelego pri "Dante, kreinto de interregiona lingvo; Zamenhof, kreinto de internacia lingvo", montrante, kiel Dante kreis la italan lingvon per elkribo de la komunaj elementoj el diversaj italaj dialektoj. Pli teknike lingvistika estis la priskribo de J. C. Wells (Londono) pri "Lingvoj piĝinaj kaj kreolaj". Kun helpo de sonbendoj li diferencigis inter piĝinoj (kontakto-lingvoj inter eŭropanoj kaj aliaj popoloj) kaj kreolaĵoj (piĝinoj, kiuj jam rolas kiel gepatraj lingvoj), kaj karakterizis ilian strukturon kaj geografian distribuon.



ENTUZIASMO KOMPENSIS MANKOJN

Kiel kutime, la nun de ĉiuj konata, kaj ŝatata, Internacia Arta Teatro prezentis du programojn malsimilajn, unu oficialan, la alian libervolan.

Sed, kiel kutime, la respondeculoj de I.A.T. kaj la geaktoroj devis fronti gravajn malfacilaĵojn, pro la ejo rezervita al la prezentadoj kaj ĝiaj mankoj. Efektive ne temis pri teatro, sed pri ĉ. 500-sidloka salono de la granda koncertejo De Doelen. Tie nenia kurteno, nek kulisoj, nek plankaj, nek flankaj lumrakoj* ktp. Oni konsentu, ke tia ejo multe komplikas la laboron de la trupo, kaj tre certe ne malmulte deprenas el la scenefektoj.

Malgraŭ ĉiuj ĉi malfacilaĵoj, I.A.T. brile plenumis, kiel ĉiujare, sian "kontrakton": oni povas nur laŭte laŭdi la artistan konsciencon de ĉiuj geaktoroj (kaj apenaŭ tie sentebliĝas etaj diferencoj ĉe la neprofesiaj membroj de la trupo) kaj la vere bonan aranĝon de la enscenigo kaj reĝisorado.

Elektio de teatraĵoj kritikinda

Ĉu do nenio kritikinda? Bedaŭrinde mi devas nun diri, ke mi ne ĝuis la elekton de la teatraĵoj. Mi kredas, ke eĉ ne unu peco vere kontentigis min. Ĉu mi do, etburĝo kaj filistro, levu mian neaŭtoritatan voĉon kontraŭ la opinio de profesiaj teatristoj? Kial ne? Por kiuj laboras la artistoj? Por la publiko. Bone; sed se la publiko ĝuste ne ĝuas? Ho! mi scias, ke multaj spektatoroj montris, ofte brue, ride kaj aplaŭde, sian plezuron. Sed estis ankaŭ aliaj, ne malmultaj, kiuj remaĉis sian seniluziigon. Ofte pledis la fondinto de I.A.T., Srdjan Flego, pri ĝia kulturiga tasko — kaj pri tio mi tute konsentas. Sed ŝajnas, ke kelkfoje, kaj ĉefe ĉi-jare, li celas pli multe amuzi la esperantistan publikon, ol ĝin vere eduki: ĉu tial ke 1967 ne estis festivala jaro?

Kion mi do riproĉas al multaj el tiuj pecoj? Generale la negravecon de la temoj, kaj kelkfoje la mallertan disvolviĝon de la komedioj. Ekz. "Skatolo, kiu muzikas", drameto de Nakamura ŝinkiĉi, estis tro longa je unu duono (la dua, ĉar jam de longe oni sciis, kio okazos, kaj temis do preskaŭ pri ripeto); la temo de "Naiva edzino", de Arkadij Averĉenko, turniĝis ĉirkaŭ virino, kiu post dek jaroj da edziniĝo ne scias, kio estas adulta amanto: ĉu ŝi ne estas pli idiota ol naiva? "Batalo ĉe

Dekstre: Nevenka Imbert, kiu vigle rolis en "Naiva edzino" de Averĉenko kaj konvinke prezentis junan blindulinon en "Skatolo, kiu muzikas", de Nakamura ŝinkiĉi.

Kazano", ŝerca sceneto de Branko Copić, kvankam pli bona, estas diktrajta farso. Kion diri pri "Holanda Pupo"? Oni ne rajtas blasfemi kontraŭ la malaperinta J. Baghy; kaj mi devas diri, ke mi pli multe ridis ĉe lia vodevilo ol ĉe la aliaj: kelkaj spritaĵoj estis tre bonvenaj. "Taso da kafo", monologo de Ivan Cankar, kaj recitado de Baghy-poemoj, estis bonaj.

Plej multaj el tiuj ĉi unuaktaĵoj sukceson ja trovus ĉe skoltaj prezentadoj, aŭ ĉe jarfinaj lernejfestoj, aŭ ankaŭ dum klubaj vesperoj. Mi ja scias, ke la elekto de bonaj unuaktaĵaj teatraĵoj estas malfacila, kaj ke per tiu prezentado de mallongaj pecoj Flego provas kontentigi multajn naciojn kaj literaturojn. Elektro de bone ĉarpentita, solideza triaktaĵo, povus veki vere artan ĝuon, sed tiam li prezentus nur unu teatron.

Sed mi devas diri, kion mi sentas pri la ĵusaj provoj de I.A.T., kaj tial mi volas rezervi mian galon ĉefe kontraŭ "La Leciono", kaj, moderna Don Kiŝoto, alimiliti la muelilon Ionesco. Mi konfesas, ke eĉ se miloj da "artosentaj" personoj (kaj verŝajne nemal multe da snoboj) alte taksis "La Leciono", la hodiaŭa kritikanto-filistro sentas la devon diri, ke li multe enuis dum tiu prezento, kaj nur lia 12-jara fileto povus amuziĝi dum la unua duono, "matematika" leciono. Jes, la publiko en Roterdamo ridis. La plej granda rideksplodo okazis dum la "filologia" parto, kiam la profesoro nete silabigis Pa-pi-li-o-Pom-pi-li-o. Jen efekto, kiun ne antaŭvidis Ionesco! Kaj tiu 17-foja (mi ne nombris!) ripeto de la lernantino "dento doloras!", jen, ĉu ne, inteligenta risorto por pluigi la disvolviĝon de la "komika (!) dramo"! Bonvola amiko provis klarigi la esoteran sencon de la teatraĵo, sed ankoraŭ hodiaŭ ĝi restas al mi tute ne evidenta. Estas ja vere, ke Charlie Chaplin, Buster Keaton, Harry Langdon, antaŭ 50 jaroj klaŭnoj malŝatataj de la tiama inteligentularo, fariĝis nun klasikuloj de la kinarto.

Feliĉe, la ardo kaj entuziasmo de la geaktoroj iom kompensis la mankojn. Oni ja scias, ke ofte la saŭco plibonigas la fiŝon, kaj la saŭco estis vere franda. Laŭdajn gratulojn al Nevenka Imbert, Jana Ravŝelj, Ljiljana Gener, Helena Buljan, Srdjan Flego, Mladen Ŝerment, Vlado Kovaĉiĉ, Jure Lipovac kaj Vanĉa Kljakoviĉ. Mi ne forgesu la reĝisoron kaj scenografon, respektive Srdjan Flego kaj Marcel Cockx. La laboro de ĉiuj ĉi meritis, ke oni studu la demandon de la elektotaj teatraĵoj, kiun mi iom impertinente levis.

Roger Bernard



* Rako: longforma tenilo por pluraj objektoj, ekz. lampoj, valvoj, ĉarpentiloj, ĉapeloj ktp.

Sur p. 124: Kuiristoj Vlado Kovaĉiĉ kaj Srdjan Flego (dekstre) petegas la poeton-partizanon Jure Lipovac, ke li priverku iliajn "heroaĵojn". Sceno el "Batalo ĉe Kazano".

Kiel oni vidas el la apude presitaj rezultoj, plej okulfrapa en la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj estis la kvarobla sukceso de Wouter Pilger. Ne kontenta nur ripeti siajn venkojn de Budapeŝt (ambaŭ ĉefpremioj por poezio), li nun aldonis al ili ankaŭ duan premion kaj laŭdan mencion. La 25-jara nederlandano ("Nova Talento" en 1963) povis kalkuli al siaj versistaj sukcesoj ankaŭ la novan diskon "Jen nia mondo", kies tekstojn li lerte esperantigis.

La kunvenon de la Belartaj Konkursoj gvidis, pro neĉeesto de la juĝkomisiona prezidanto, la sekretariino s-ino Emilija Lapenna. La juĝantojn reprezentis s-ino Conterno (poezio) kaj s-ro Bernard (prozo). Menciinte enkonduke, ke ĉi-jare 33 aŭtoroj el 16 landoj kontribuis 84 konkursaĵojn, s-ino Lapenna proklamis la rezultojn kaj invitis al la mikrofono s-ron Pilger, kiu mem deklamis siajn ĉefpremiitajn verkojn kaj iom aldonis pri la 17-ajarcenta poeto P. C. Hooft. Ĉeestis persone ankaŭ s-ro Tibor Sekelj. Li deklamis sian premiitan rakonton "Geniulo", amuza ilustro de la ideo, ke "ekzistas bonfaroj, kiujn estas neeble plenumi laŭleĝe". S-ino Conterno vigle aktoris la vivoscenon "Antaŭen" de Jiří Kořínek, kaj s-ro Bernard deklamis "La rakonto pri maljunaj virinoj", tradukitan de T. Tyblewski. Rimarkinde, el 80 verkistoj de 23 landoj premiitaj de post la komenco de la modernaj Belartaj Konkursoj, Tyburcjusz Tyblewski estas la unua el Pollando. La premioj sumiĝis ĉi-jare je 700 gld.

Oratoroj serĉataj

Kvankam la Oratora Konkurso allogis ĉirkaŭ 300 aŭskultantojn, ĝia altira forto por la junularo ŝajnas malpli granda. Kiel en la 51-a, ankaŭ nun konkursis nur kvar. Kaj tamen ĉiu movado tre bezonas konvinkajn oratorojn. Kiu kulpas?

Emocie konvinka kaj tre klare konstruita estis la parolado de Francisko Simonnet (Francujo), pri "La batalo kontraŭ malsato kaj analfabeteco". Al li la komisiono (d-ro Tonkin, prez., s-roj Becker kaj Bernard) aljuĝis la

unuan premion. La duan gajnis s-ino Eliza Kehlet (ĝis antaŭ nelonge f-ino Weide) per la sama temo. Sed gejunuloj! jam nun preparu vin por konkursi en Madrid! Vi riskas nenion krom gajni monon, pokalon kaj honoron.

BELARTAJ KONKURSOJ: REZULTOJ

Originala poezio

1. Wouter F. Pilger (Nederlando): "Mia ĉio".
 2. Carmel Mallia (Malto): "Forporto".
 3. Jiří Kořínek (Ĉeĥoslov.): "Vojo kaj tempo".
- Laŭda mencio:
4. Jiří Kořínek (Ĉeĥoslovakujo): "Antaŭen".

Tradukita poezio

1. Wouter F. Pilger (Nederlando): "Bela nimfin'" de P. C. Hooft.
 2. Wouter F. Pilger (Nederlando): "Ĉu do ne plu mi ĉarmos" de P. C. Hooft.
 3. Tyburcjusz Tyblewski (Polujo): "La rakonto pri maljunaj virinoj" de Tadeusz Rozewicz.
- Laŭda mencio:
4. Wouter F. Pilger: "Galatea" de P. C. Hooft.

Originala prozo

1. Nealjuĝita.
2. Tibor Sekelj (Jugoslavio): "Geniulo".
3. (egalaj) Aleksandro Polacsek (Hungarujo): "La kuzino"; Tyburcjusz Tyblewski (Polujo): "En la puto".

Originala dramo

- 1-3. Nealjuĝitaj.
- Laŭda mencio:
4. Vilmos Benczik (Hungarujo): "La ponto".

Nova Talento (Pokalo Harabaĝiu)

E. N. Mulders (Nederlando) pro originala poemo "Limeriko".

Foto-konkurso

- 1-3. Ne aljuĝitaj.

ORATORA KONKURSO: REZULTOJ

1. Francisko Simonnet (Francujo).
2. Eliza Kehlet (Danujo).
3. Ne aljuĝita.

ARĜENTA SPRONO DE KOKO

Ĉi-jare ne aljuĝita.

La lasta juĝo pri la Oratora Konkurso: interkonsiliĝas (de dekstre) Becker, Tonkin, Bernard



La Varia Vespero

Dufoja prezento donis al ĉiuj kongresanoj eblecon ĉeesti la Varian Vesperon, kaj, efektive, preskaŭ ĉiuj ĝin ĉeestis. La aranĝo de tia vespero kun minimumaj financaj rimedoj dependis, kiel enkonduke klarigis f-ino Vermaas, de la senkondiĉa sindono de kelkaj invititaj kunlaborantoj.


Ŝajnis paradokso, ke Ramona van Dalsem, kies disko "La feliĉo" jam tutmonde diskonigis, aperis jen la unuan fojon antaŭ vere internacia publiko. En tiu ĉi kongresfina vespero ŝi ĝuis du avantaĝojn: entuziasma publiko kaj bonega akustiko, kiu cetere favoris bonan ekvilibron inter ŝia voĉo kaj la delikata akompano de Toos Schoonman. Tiel spronite, ŝi kantis kun granda ĉarmo kaj profesia brilo. La plej longajn aplaŭdojn gajnis "La aŭtuno", en kiu la vortriĉa teksto de Baghy solide subtenas la melodion, la nova "Donu al mi vian manon, amiko", aktuale kontraŭmilita temo, kaj "La eĥo", bis-prezentaĵo en kiu kuneĥis la gracia filino de la kantistino.

Bankedas novgeedzoj Eliza kaj Torben Kehlet



La alia kolono de la vespero, Nikolaj Rytjkov, ne estas novega talento. Sed lia deklamarto, la esprimivaj, ĝisfunde studitaj gestoj, la originala tekniko, ĉio ŝajnas des pli perfekta, ju pli oni lin vidas. Se la paŭzoj inter programeroj estis iom improvizaj, iom trenitaj, la malo validas pri la deklamaĵoj mem. "Blinda almozo" de Marjorie Boulton malkovris al ni la dramajn kvalitojn de ŝia poezio; la gurdita "Estas mi esperantisto" de Baghy tute refreŝigis sur lia dango; emociis la flustrita "senespera" en la kaloĉaja "En amara horo". Kaj ankoraŭ li donis al ni Shakespeare, Auld, Rossetti, Raymond Schwartz...

La ceteran programon ne eblas recenzi sur la sama nivelo. Toos Schoonman ludis kun koncentriĝa zorgo tri fortepianajn pecojn, sed la elekto, precipe Chopin, montriĝis iom tro



Sceno el la desegno-filmo de Richard Brace

ambicia. Membroj de la Haga Teatra Grupo prezentis du skeĉojn de Raymond Schwartz; ne mankis entuziasmo, tamen la kontrasto kun la polurita prezento de Rytjkov estis granda.

Meritas apartan laŭdon la bone preparita enkondukado de f-ino Vermaas kaj la originala programfolio en formo de floro, kiun plurcentope pretigis propramane s-ino J. Carli.

Aliaj distraj aranĝoj

Kaj la Interkona Vespero kaj la Oficiala Balo ĝuis la saman vastan kaj tute taŭgan ejon: la halo de la kongresejo. La antaŭbalan Bankedon partoprenis 220 personoj. Honora prezidanto s-ro Holmes direktis tostojn al UEA kaj ĝia prezidanto, al LKK Tel Aviv kaj al la nederlandaj organizintoj. Ambasadoro Ralph Harry solene transdonis memoraĵojn por la Aŭstralia Cambro en la Domo de UEA.

Inter la multaj filmoj videblaj dum la Kongreso estis la hungara "Esperanto-fonto" kun Esperantaj sub-titoloj (priskribita en aprilo, p. 58-9), "La Nov-Zelandanoj", "Fiat 124" kaj "Operacio sekureco", ĉiuj kun Esperanta komentario, la Esperante parolanta "Oomoto-festivalo" kaj tute nova filmo el Usono, "La tago, kiam infanoj interligis la manojn". Tiu lasta estas 20-minuta kolorfilmo 16-milimetra kun kontraŭmilita temo. Lerte konstruita el desegnaĵoj de japanaj kaj usonaj infanoj, ĝi rakontas en Esperanto, kiel infanoj savis la mondon de milito. Reĝisoris Richard Brace, memstara TV-filmisto, kiu nun preparas eldonojn ankaŭ alilingvajn.

Dank' al perfekta vetero, la kongresaj ekskursantoj povis esti tre kontentaj. Entute 188 vizitis la urbon Rotterdam, tiel ke necesis unu ekstra aŭtobuso; 134 en tri aŭtobusoj vizitis sud-okcidentan Nederlandon, dum 140 ŝipveturis tra riveroj kaj kanaloj enlandaj. En la momento de verkado ankoraŭ daŭras la postkongresaj aranĝoj, kun entute 50 aliĝintoj.

ADIAŬO AL LA KVINDEK-DUA

Merkredon, la 9-an de aŭgusto, 400 personoj kolektiĝis en De Doelen por la lasta programo de la 52-a: la Solena Fermo — kaj fine, kiel rimarkigis la prezidanto, "La ĉielo ploris". Konvena fono por adiaŭo kaj konvena ankaŭ por la silenta omaĝo al la forpasintaj eminentuloj — Baghy, Isbrucker, Pragano, Maillard, Scherer, Krestanov, Brunet — per kiu la solenaĵo komenciĝis.

La laboro daŭras

La kunsido aŭdis de la ĝenerala sekretario la ĉefajn rezultojn de la kongresaj laboroj, pri kiuj oni legu sur aliaj paĝoj, kaj aplaŭdis la novan konsiston de la Estraro. Kun la admono "La Kongreso finiĝas, sed la laboro daŭras" s-ro Becker redonis la parolon al la prezidanto, kiu voĉlegis la tri kongresajn rezoluciojn. Ĉiujn tri oni akceptis per ĉiuj voĉoj. Aparte fortan aprobon ricevis la aludo al diskriminacio.

Post la anonco pri la venkintoj en la Belartaj Konkursoj (s-roj Pilger kaj Sekelj aplaŭdate transprenis mem la diplomojn) kaj Oratora Konkurso (s-ro Simonnet ricevis la pokalon Ivo Lapenna), venis la momento por danki al ĉiuj, kiuj laboris por la Kongreso: al la Centra Oficejo, al la helpantoj el Rotterdam kaj Hago kaj al la Nederlanda Esperanto-Asocio, al f-ino Vermaas, kiu rolis kvazaŭ prezidanto de LKK, al Marinko Gjivoje de la Gazetara Servo, kaj al s-ro Pompilio, kiu faris grandajn laborojn en eksterordinaraj cirkonstancoj. Kiel diris la prezidanto, la Kongreso estis "kvankam malgranda laŭ la nombro de aliĝintoj,unu el la plej ĉarmaj kaj bone organizitaj en la lastaj jaroj, sendube." Dankis siavice la KKS

al ĉiuj helpintoj. Li volus mencii tiujn, kiuj plej multe helpis, "sed fakte ĉiuj plej multe helpis". Specialan dankon li direktis al la urba kongresoficejo de Rotterdam, kies sidejo estas en De Doelen mem, kaj kiu ege faciligis lian taskon.

Kvazaŭ en ĉina skatolo (aŭ rusa pupo) sekvis en la kadro de la Solena Fermo alia solena fermo: de la TEJO-kongreso, pri kiu raportis la prezidanto de TEJO, Ivo Osibov. Li anoncis i.a. la ceteran konsiston de la nova TEJO-Estraro: vic-prezidantoj U. Lins kaj R. Dobrzyński, ĝen. sek. H. R. Tonkin, kasisto W. Pilger, estraranoj H. Bakker, S. Čolić kaj P. Todorov.

Prof. Sancho-Izquierdo havis la taskon inviti la kongresanojn al la 53-a en Madrid. Kiel partopreninto de la UK en Barcelona en 1909 li bone scias, ke de tiam la hispanoj ĉiam sopiradis denove bonvenigi Universalan Kongreson. Simbole li transprenis el la brakoj de prof. Lapenna la kongresan standardon.

Ni estu fieraj

Laste petis la parolon s-ro Wensing, vic-prezidanto, por diri kelkan dankon "al tiu homo, kiu dum la tuta daŭro de la Kongreso nelacigeble laboregis, Ivo Lapenna. ... Ni estu fieraj, ke nia Asocio posedas kiel prezidanto homon kun tiaj elstaraj kvalitoj." Per granda aplaŭdo kaj la versoj de "La Espero" finiĝis la 52-a Universala Kongreso.

Noto: Se iu persono surbendigas la Solenan Fermon en Rotterdam, li estas petata kontakti kun la Konstanta Kongresa Sekretario, per la adreso de UEA, kiu deziras akiri kopion.

Tostantoj ĉe la prezida tablo dum la Oficiala Bankedo: maldekstre f-ino M. H. Vermaas kun ambasadoro Ralph Harry; dekstre ges-roj E. L. M. Wensing kaj s-ro H. W. Holmes.



NOTOJ MARGENE DE LA KONGRESLIBRO

Pri fakaj kunvenoj ne eblas raporti ĉi tie, sed nur mencii, ke kunvenis sciencistoj, medicinistoj, geografoj, juristoj, instruistoj, fervojistoj, skoltoj, turistoj, aŭtistoj, pacaktivuloj, militrezistantoj, katolikoj, evangeliaj kristanoj, kvakeroj, ekumenistoj, spiritistoj, oomotanoj, martinusanoj k.a. Detalojn oni legu en la koncernaj organoj.

La Akademia kunveno estis nepublika, sekve ne raportebla. En la lastatempaj regulaj elektoj eniris la Akademion prof-oj Ariste kaj Djoudjeff, s-roj Mijake, Rossetti, Sonnenfeld kaj Tárkony, kaj f-ino Boulton. La Akademio ankaŭ elektis s-ron A. Broise Korespondanto por la Sekcio Teknika Vortaro.

Ĉe Diservoj katolika kaj evangelia predikis respektive patro Wannemakers kaj prof. Hořský.

Kongresanoj aliĝis entute el 34 landoj, sume 1265 personoj. Plej multenombraj: nederlandanoj kaj francoj. Plejparte ne sukcesis atingi Rotterdam la orient-eŭropanoj kaj israelanoj, sed alvenis pli ol 70 el Jugoslavio kaj ĉ. 15 el Japanujo — grupo sufiĉe rimarkebla.

En la dokumentujoj troviĝis la 80-paĝa Kongresa Libro, kiun pro la apartaj cirkonstancoj ne eblis dissendi antaŭe. Ĝia kovrilo kombinis bildojn de Tel Aviv kaj Rotterdam. Krome oni trovis mapojn, turismajn broŝurojn kun aldona Esperanta teksto, la insignon ktp.

La Kongresejo, kiel dirite, estis ideala: tre moderna, freŝa, komforta kaj vasta. Diskreta fonmuziko trankviligadis la nervojn.

La "giĉetoj" (fakte ne giĉetoj, sed servotabloj) estis oportune aranĝitaj en longa vico flanke de la kongreseja halo. Dank' al volontuloj el Rotterdam, Hago, Leiden (la tuta familio Koopmans) kaj aliaj lokoj kaj al la oficistoj de la C.O., daŭre funkciis servoj loĝiga, ekskursaj, filatela, kasa, librovenda, informa, memoraĵa, gazetara, akcepta (en la stacidomo de 08.00 ĝis 23.00 h.), fotografa, kaj de UEA, 53-a UK Madrid (70 aliĝoj dum la Kongreso), TEJO, IAT kaj vendo de tagaj kongreskartoj. La libroservo vendis entute je valoro de ĉirkaŭ 7000 gld, do meze po 10 gld. por ĉiu ĉeestanta kongresano. Bone vendiĝis la novaperaĵoj: la disko "Jen nia mondo" (80 ekz. venditaj), jugoslavaj infanlibretoj, la disko de poemoj de Baghy, "Utila manlibro pri Hindujo" de s-ino Haudebine, "Freŝa mateno", romano el Israelo. "Vortoj de prezidanto Maŭ zedong" alvenis kvante nur post la fermo. Prof. Lapenna kaj d-ro Neergaard ĉeestis foje por subskribi siajn verkojn, kiel ankaŭ s-ino van Dalsem.

Informojn en Esperanto pri mondaj okazaĵoj presigis sub aparta rubriko la ĵurnalo Rotterdamsch Nieuwsblad, ĉiutage vendata en speciala giĉeto en la kongresejo. Dufoje ĝi akcep-



Libroservo kaj aliaj 'giĉetoj' en la kongresejo

tis interesitojn en sian presejon, kie gvidis kaj klarigis s-ro W. Zwagers. Prikongresajn informojn disaŭdigis ĉiutage Radio Varsovio kaj plurfoje Budapeŝto.


La Domo de UEA restis fermita dumkongrese, ĉar ĉiuj oficistoj laboris en De Doelen. Tamen dum la ekskursaj tagoj multaj (eĉ tuta karavano!) kaptis la okazon ĝin viziti.

La plej interesa propono de la semajno: ke generalo De Gaulle estu nomita honora prezidanto de UEA, ĉar neniuj aliaj en la lastaj jaroj tiel kontribuis al la akriĝo de la lingva problemo (sugestis d-ro Bormann).



En la unua kongrestago aperis ĉi tiu longedaŭra stereofona/monofona disko, en kiu nederlandaj gekantistoj prezentas kantojn de Bob Dylan kaj Pete Seeger. Dank' al lerta reklamo de la eldonejo Iramac, en Rotterdam ĝi estis preskaŭ pli okulfrapa, ol la Kongreso mem. Montris ĝin ĉiuj ĉefaj diskovendejoj, kaj la plej granda magazeno pendigis ĝin en ĉiu sia montrofenestro. En la diskofako de la sama magazeno staris nepretervidebla speciala stando pri tiu "unua stereofona longedaŭra disko en Esperanto en la mondo", kaj tie ĝi ankaŭ bone vendiĝis. Prezo: 16,50 gld. + 10% sendokostoj.

esperanto
septembro 1967



LA JUNA VIVO

Estis la samaj malfacilaĵoj, kiujn frontis Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kiam ĝi kune kun UEA devis decidi pri alilokigo de sia ĉijara kongresurbo. Sed dum UEA povis apogi sin sur forta organiziteco koncerne kongresaranĝadon, tio ne eblis ĉe TEJO. Danke al la bonegaj rilatoj inter ambaŭ organizaĵoj oni tamen venis al solvo, kiu ja ne tute povis kontentigi, sed kiu almenaŭ certigis la okazigon de la 23-a IJK. La solvo estis simpla: UK akceptis la junularan kongreson en sian sinon, t.e. ĝi liveris ĉiajn eksterajn teknikajn bezonaĵojn, tiel ke TEJO preskaŭ nur devis zorgi pri la programo mem. Kaj ankaŭ tiurilate ĝi ĝuis konsideregindan helpon flanke de Nederlanda Esperanta Junularo kaj Germana Esperanto-Junularo, kiuj rezignis pri sia Eŭropa Junulara Konferenco okazonta en Enkhuizen kaj disponigis sian prelegantaron kaj temaron al la 23-a IJK.

LA 23-A INTERNACIA Natanja

faritajn planojn, kiam venis la decido pri Rotterdam. Tamen oni povis esti kontenta pri la kvalito de la kongreso laŭ la lingva nivelo. Apenaŭ oni trovis anon nekapablan pri lingvoregado. Grandskale mankis krokodiloj. Efektive, la "kremo" de la tutmonda esperantista junularo ĉeestis.

Pri la eksteraj aspektoj ne necesas paroli ĉi tie, ĉar la kongresejon certe laŭdos alia raportanto sub la priskribo de la Universala Kongreso. Devas ĉi tie nur aldoni, ke la elirbazo de la IJK estis la ŝipo "Jan Backx", restanta en la parkhaveno apud la panoram-turo "Euromast" centre de Rotterdam. Tiu ŝipo servanta normale por maristinstruado disponiĝis al la anoj de IJK kiel dormejo, maten-



La Inaŭguro de la 23-a IJK. Parolas la prezidanto Ivo Osibov. Aliaj de maldekstre: Wouter Pilger, Erik Carlén, Ulrich Lins, Humphrey Tonkin kaj Günther Becker.

La nombro de partoprenintoj estis relative malalta (proks. 90), se oni komparas ĝin kun la ciferoj de la antaŭaj jaroj kaj speciale kun la rekorda nombro atingita en la pasint-jara 22-a IJK en Pécs, kiu elmontris dekoblan anaron. La kaŭzo sufiĉe simple eksplikeblas: al Natanja pro financaj kaŭzoj aliĝis kompreneble limigita nombro. Kiam venis la decido pri transigo al Rotterdam, tiuj alnatanjiĝintoj aliĝis al Rotterdam, sed, malgraŭ alvoko de la prezidanto de TEJO, nur malgranda aldona aro, kiu ne havis la intencon iri Israelon. Tio klarigeblas el la fakto, ke ok semajnojn antaŭ aŭgusto preskaŭ ĉiu jam planis siajn feriojn kaj ne plu volis renversi

manĝejo, balejo kaj komitatejo ktp. Ke la ŝipo havis proksimume same altan aĝon kiel multaj UK-enloĝantoj (kiuj plenigis ĝin apud la TEJO-anoj), ne ĝenis tro, ĉar la junularo estas tolerema. Ne tolerema la junularo certe devus esti kontraŭ la altaj kostoj de partopreno en la IJK. Tio validas precipe por tiuj, kiuj origine aliĝis al Natanja. Ili ricevis parteton de la kotizo pagita al Israelo, kaj la resto kovris nur dormadon kaj matenmanĝon. Ke la vivkostoj en Nederlando sufiĉe altas, menciigu krome. Estu tute nete akcentite, ke oni ne ekspluatu la junularon, alikaze niaj kongresanaroj plie reduktiĝos!

Nun al la programo mem: "Nederlando—

JUNULARA KONGRESO Rotterdam

kulturo kaj socio" estis la tegmenta temo, pri kiu parolis aro da kvalifikitaj personoj. Kaj mi devas fakte konstati, ke ili sukcesis prezenti al interesitoj (kies nombro ne superis la duonon de la IJK-anaro) trajtojn de Nederlando, kiuj diverĝas de aliaj nacioj. Tamen pli forte impresis la komunecaj problemoj, kiujn Nederlando havas same kiel aliaj nacioj en la mondo.

D-ro G. Makkink, sciencisto pri biologio, prelegis pri "La biologio en kunligo kun la kontraŭmara laboro". Jen unu esenca trajto de la nederlandaj popolo kaj tero, kiu distingas ilin elde la nacioj de la cetera mondo. Admire ni povis sekvi la vortojn kaj klarigajn lumbildojn, kiuj eksplikis la miljaran marŝon de la nederlandanoj kontraŭ la maro. Ni eksciis, ke la forigo de la IJsselmaro kaj ĝia polderigo ne nur pro tergaĵo estas farita, sed ĉefe ankaŭ pro unu el la plej gravaj biologiaj problemoj de Nederlando, la havigo de sufiĉe da akvo sensala. Parenteze tiun problemon ekzistenciale frontis la nenederlandaj kongresanoj, kiuj komence apenaŭ kapablis uzi la akvon de Rotterdam eĉ nur por dentpurigado, por ne paroli pri trinkado. Pli detale elmeti la punktojn de la ege interesa prelego ne eblas ĉi tie, kvankam indus.

Robbert Groeneveld, studento de astronomio, parolis pri "La politiko de Nederlando". Tamen la enhavo de tiu prelego ne tiom rilatis al kompleta priskribo de la nuna oficiala politiko, kiom al la prezento de plej novaj trajtoj de la politika vivo de Nederlando, kiuj famiĝis eĉ ekster la limoj de tiu lando. Temas pri la du movadoj "Provo" kaj "demokratoj 66", kies trajtoj estas esence novaj kaj interesaj por la tuta mondo. R. Groeneveld tre lerte klarigis koncize la ideologion de tiuj grupoj, kiuj laŭ siaj opaj metodoj protestas kontraŭ vundaj punktoj de la hodiaŭa industri-socia sistemo devigante ĝin rekonsideri la nunan staton, pere de ekstersistemaj manifestacioj, kiel ekz. hapeningoj ("Okazaĵoj").

A. den Haan enkondukis nin en la "Literaturon de Nederlando" per elmontrado de la evoluo kaj influo de la nederlanda lingvo unue kaj due per okupiĝo pri la nederlanda literaturo post 1860. Ĉefa trajto de lia traktado estis la alternado de la estetiko kaj la tendenco en la nederlanda literaturo de tiu tempo. Tre bone estis, ke la parolinto sufiĉe multe da tempo dediĉis al rekta citado de la koncernaj verkoj. Same tio okazis ĉe la temo "Fragmentoj de Nederlanda Kulturo" kunmetitaj de Wouter Pilger, nia granda abonanto je aro da belartkonkurs-premioj kaj prozeca okupanto de la TEJO-posteno pri financaj aferoj.

La prelego de Jan Schaap, instruisto pri arto, prezentis la "Arton de Nederlando". La enhavo de la prelego estis altnivela, kaj ĝin evidentigis aro da pentraĵoj montritaj. Klariĝis, ke la nederlanda arto nuntempa, kaj



Venkitaj kandidatinoj Vesna Staničić, Eja Woessink kaj Birgitte Haupenthal aplaŭdas al Miss Esperanto 1967: Rie Anzai, studentino el Tokio.

pri tiu temis, ne estas nederlandeca, sed nederlanda kontribuo al mondsama evoluo, kiu apenaŭ diferencas laŭ nacioj. Speciale interesa estis la ekspliko de novaj tendencoj en la arkitekturo. Montriĝis granda simileco inter la ideoj de la Provo-movado kaj tiuj de la moderna arto.

Prelegon ekster tiu memorenda serio havigis Reinhard Haupenthal, nia konata literaturscienca talento, UEA-ĉefdelegito ktp. Tri ekstremoj signis tiun prelegon pri "Esperanto-literaturo": unue ekstreme malalta nombro de ĉeestintoj (proks. 10, el kiuj tamen apenaŭ unu dormis kontraste al certa alia prelego, kies preleginto lulvoĉis), due ekstreme mallonga prepartempo (kelkaj noktaj horoj, kiuj tamen por literaturistoj povas esti bonefikaj) kaj trie kompare instruega enkonduko en kampon, pri kiu ordinara esperantisto scias duonan paĝon.

Alfrontigon kun la organizaj demandoj donis la ĝenerala kunveno de TEJO kaj la kvar komitatkunsidoj, kiuj estis terure viglaj, eĉ akraj, spicitaj, impulsdonaj, laborriĉaj kaj longdaŭraj (sume pli ol 13 horoj!). La malnova estraro reelektiĝis montrante Ivo Osibov denove ĉe la pinto. Ne estas spaco ĉi tie por detaligi pri la tamen gravegaj opaj punktoj, ni devas direkti interesitojn al la informoj de TEJO alilokaj. Menciita estu la partopreno de TEJO en la "Jaro de internacia turismo" pere de vigla diskutado, kiu okazis en la kadro de la 23-a IJK.

La oratoran konkurson gajnis el 4 kandidatoj Francisko Simonnet, senlaca komitatkunsida protokolinto, kiu same kiel la dua gajnintino, Eliza Kehlet, traktis la malsaton en la mondo kaj plibonigis per tio sian guldenan kasstaton evitante malsaton en Nederlando. Gaja kulmino – junulara balo sur la ŝipo.

D-ro H. M. Maitzen

esperanto
septembro 1967

LAŬLANDE

Britujo

- La Skota Sendependa Televido elsendis je 4 maj 67 intervjuon kun la prezidanto de UEA pri UEA kaj pri la Peticio de 1950 kaj Propono al UN en 1966.

Bulgarujo

- Prof. Petr Dinekov, preleginto de ISU en 1963, fariĝis regula membro de la Bulgara Akademio de Sciencoj.

Ĉeĥoslovakujo

- 40-leciana Esperanto-kurso de V. Heimlich aperis de oktobro 1966 ĝis junio 1967 en "Pionierske noviny", dusemajna gazeto por 9-15-jaraj gelernantoj. Eldonnumero: 73 000.

Germanujo

- La 45-an Germanan Esperanto-Kongreson en Hamburgo (12-16 maj 67) ĉeestis 240. GEA elektis d-ro Werner Bormann kiel sian novan prezidanton. Lige kun la kongreso aperis en televido scenoj el la filmo "Angoroj".

Hispanujo

- La ilustrita revuo "La Actualidad Española" en sia numero de 9 mar 67 dediĉas tri paĝojn al la urbeto Chestre apud Valencia, el kies 6000 loĝantoj "4500 parolas Esperanton".

Israelo

- S-ro Reuven Kritz, konata hebrea aŭtoro, kies romano "Freŝa mateno" ĵus aperis en Esperanta traduko de Ota Ginz, mem eklernis Esperanton kaj korespondis tiulingve kun la tradukinto.
- Okaze de la 50-jara datreveno de morto de d-ro Zamenhof, ges-roj Oskar kaj Doria Berman el Hadera plantis 50 arbojn je la nomo Zamenhof en ŝtata arbaro.

Kanado

- Esperanto-stando funkcias en la kadro de la ekspozicio de Kanada Skolta Asocio en la Mondekspozicio Expo 67 en Montreal. Estas la unua fojo de post 1910, ke tia stando troviĝas en unu el la Mondekspozicioj.

Malto

- Malta radio intervjuis s-ron R. Caruana en 1/2-hora elsendo pri Zamenhof kaj Esperanto la 14-an de aprilo.

Nederlando

- La 22-an de septembro festas sian 80-an datrevenon s-ino Julia Isbrucker, honora membro de UEA.

Norvegujo

- La 40-a kongreso de NEL en majo akceptis rezoluciojn pri internacia kunlaboro, pri turismo, pri la participoj kaj pri neologismoj.

Nov-Zelando

- La Laborista Partio de Nov-Zelando, la plej grava opozicia partio, akceptis en sia jarkongreso en majo rezolucion favoran al Esperanto kiel studobjekto en nov-zelandaj lernejoj.

Polujo

- Post longa paŭzo reaperis en pli bela (presita) formo la alloga organo de Pola Esperanto-Junularo, "Tamen". Redaktas Stanisław Świsłak. Adreso: Poŝtfako 198, Kraków. Dumonata, 16-paĝa, ilustrita, tute en Esperanto.

Soveta Unio

- La 27-an de majo Taŝkenta televido elsendis 1/2-horan programon pri Esperanto, videblan en tuta Uzbekujo, kun multaj partoprenantoj uzbekaj kaj rusaj.

LAŬFAKE

Interlingvistiko

- Ak. E. Villborg (Prästgårdsängen 23, Göteborg S, Svedujo) komencis eldoni interlingvistikan cirkuleron "Fokuso", multobligitan. "La ĉefan parton de 'Fokuso' formas la bibliografio".

Ornitologio

- En la faka revuo "Le Gerfaut-De Giervalk" aperis flandralingve kun ampleksa resumo en Esperanto la rezultoj de la internacia enketo pri la migrado de la kukolo, kiun kondukis pere de Esperanto d-ro Wim De-Smet en la jaroj 1961-65.

Televido

- Rusa aktoro Nikolaj Rytjkov ĉefrolas en nova filmo de reĝisoro Wolfgang Sleif, kiun elsendos la germana TV en novembro. Rytjkov kaptis paŭzon en la filmado (en Hamburgo) por partopreni la Universalan Kongreson en Rotterdam.

Turismo

- Voĉdonado inter legantoj kaj abonantoj de la nova revuo "Esperanto-Turismo" starigis fakan organizaĵon "Internacia Turisma Esperanto-Asocio". Detaloj aperas en "Esperanto-Turismo" (vidu aprilo, p. 65).
- Aperis novaj prospektoj en Esperanto pri Valladolid kaj Tarragona (Hispanujo), Dunaújváros, Gyula, Kalocsa, Kecskemét kaj Sás-tó (Hungarujo), "Evoluon" en Eindhoven (Nederlando), Lund (Svedujo). Oni petu ilin de la koncernaj turismaj oficejoj. Ĉe Sveda Instituto, Kungsgatan 42, Stockholm C, aperis nova flugfolio "Faktoj pri Svedujo".

CITAĴOJ

Viando-vendejo en Naharija, Israelo anoncas anglalingve: "Butcher kills himself twice daily" (Buĉisto memmortigas dufoje tage).

F. Cyril James en "Unesco Courier": "Kvankam kaj la angla kaj la franca estas la jure rekonitaj lingvoj de Kanado, la plimulto de kanadanoj parolas nur unu el ili."

"Moscow News": "La rusa, apud la angla kaj franca, ĉiam pli fariĝas internacia lingvo. Parolas ĝin pli ol 300 milionoj da homoj tra la tuta mondo."

MARTIN L. KAIN

D-ro Martin L. Kain el Illinois, Usono, aliĝinto al la 52-a UK en Rotterdam, mortis en aŭto-akcidento la 9-an de aŭgusto apud Rilland Bath, Nederlando, kune kun sia edzino Emily, bo-gepatroj kaj 15-monata filo. D-ro Kain, 27-jara, laboris en la fako de anestezo de la Universitato de Leeds, Britujo.

JOSEPH R. SCHERER (1901-1967)

La 20-an de julio forpasis Joseph Scherer, konata unuavice pro la unika mondvojaĝo, kiun li entreprenis en 1930-1932 kiel sendito de Internacia Centra Komitato en Genevo. Dum la vojaĝo, kiun Scherer priskribis en sia libro "Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo" (1933), li faris 322 paroladojn pri kaj per Esperanto en 41 landoj. Li estis akademiano de 1935 ĝis 1964 kaj malnova membro kaj delegito de UEA, DM de antaŭ ses monatoj.

GASTON MAILLARD (1876-1967)

La 7-an de julio forpasis en Bourg-la-Reine, Francujo, la 90-jara d-ro G. Maillard, pioniro de la franca movado kaj, kun G. Davidov, la plej malnova esperantisto de la mondo. Li eklernis la lingvon en oktobro de 1892, ek-

gvidis kursojn en 1902 kaj ĉeestis la 1-an UK en Boulogne en 1905. Delonge li malavare subvenciis la agadon de la junularo. Siatempe li fondis la nacilingvan informbultenon de UFE. Li estis malnova membro kaj delegito de UEA. Ekster la Esperanto-movado, li ricevis la titolon de honora medicinisto ĉe Bicêtre kaj Salpêtrière, du el la plej famaj parizaj hospitaloj.

RAGNVALD RIAN (1891-1967)

En Trondheim, Norvegujo, forpasis s-ro Ragnvald Rian, honora membro de UEA, 76-jara. Li esperantistiĝis jam en 1906 kaj estis estraro de Norvega Esperantista Ligo (NEL) preskaŭ sen interrompoj 1911-67. De 1913 li estis delegito de UEA kaj ĉefdelegito por Norvegujo 1935-57. Rian verkis korespondan kurson (1923), Norvegan-Esperantan Vortaron (1932), Esperantan-Norvegan Vortaron (1949) kaj Norvegan-Esperantan Vortaron (1963).

ALBIN JOHANSSON (1882-1967)

Mortis en Höganäs, Svedujo, Albin Johansson la 19-an de junio. Li lernis Esperanton en 1906, instruis ĝin al centoj da lernantoj kaj estis delonge delegito de UEA.

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

(Notlibro). Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino (1967). 234 p., 13 × 9 cm., koloril., plasta bd. Senpaga por abonantoj de EPC.

Eterna printempo, verkoj de Julio Baghy. Kompilis Reto Rossetti. Eldonejo neindikita. 22 p. 25 × 20 cm., multobl. 1,10 gld.*

Bukedo. Antologio poezia, orig. kaj trad. (Eld. Esperanto-Societo Bristol, 1965). 19 p. 25 × 20 cm., multobl. 1,10 gld.*

Plena Esperanto juda vortaro kaj plena juda Esperanto vortaro, de Harry Fineman. Eld. la aŭtoro, Montreal, 1966. 149 + 316 p., bind., ofset.* 27,— gld.*

El poezio de Julio Baghy. Recitas Nevenka Imbert kaj Mladen Šerment. Eld. Studenta Esperanto-Klubo, Zagreb (1967). Disko 17 cm., 33 r/m, daŭro 17 min.* 3,80 gld.

Poŝvortaro Esperanta-Hispana, Hispana-Esperanta, de J. Paluzie-Borrell. Eld. Sopena, Barcelona, 1967. 381 p. 14 × 8 cm.*

Faktoj pri Nederlando. (Dua) eld. Ministerio de eksterlandaj aferoj, Hago, 1967. 48 p. 20 × 10,5 cm., il. Senpaga.

De kie venas la korektaj ideoj de la homo? kaj Esti oponata de la malamikoj estas afero bona sed ne malbona, ambaŭ de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 2 p., 3 p., resp., 15 × 10 cm.* Po 0,25 gld.

Alte tenu la grandan ruĝan standardon.... Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 37 p. 14 × 9 cm.* 0,40 gld.

Hispanio por vi. Eld. Subsecretaría de Turismo, Madrid, (korektita represado 1967). 71 p. 22 × 12 cm., ilus.

La Latvia Soveta Socialisma Respubliko. Eld. Zvaigzne, Riga, 1967. 14 p. 20 × 14,5 cm.

La Heidelberga Katekismo, de Ursinus kaj Olevianus. El la germana tr. W. J. Downes. Eld. Oekumenische Liga e.V., Delmenhorst, Germanujo, 1967. 46 p. 14,5 × 10,5 cm.* 1,65 gld.

Aŭdi sen aŭskulti, radioprediko de Lars Wikander. Eld. Esperanta Misio, Östansjö, Svedujo, 1967. Evangelia serio n-ro 15. 11 p. 15 × 11 cm.

Maksimoj por la revoluciuloj, de Shaw. El la angla tr. Husen M. Al-Amily, Daftardar Bldg., 8 th Fl. (Apt. 5), Banks' St., Bagdad, Irako. 10 p. 33 × 21,5 cm., hektogr. (Ricevita kun div. neampleksaj tradukoj kaj politikaj cirkuleroj de la sama aŭtoro.)

Ne grimacu! Naŭ originalaj rakontoj humuraj de Ueyama masao. Eld. L'omnibuso, Kioto, 1967. 84 p., 17,5 × 11 cm. Ofsetita. 2,— gld.*

Utila manlibro pri Hindujo, de M. Haudebine. Eld. Hinda Instituto de Esperanto, New Delhi, 1967. 76 p. 24,5 × 19 cm., il.* 5,— gld.

Ĉu vi parolas Esperante? de Magda Šaturová-Seppová. Slovaka Pedagogia Eldonejo, Bratislava, 1965. 133 p. 15 × 10 cm., plaste bind. 5100 ekz. Konversacia manlibro.*

Jarlibro de Japania Esperanto-Movado 1967. 40 p. 21 × 15 cm. Japanlingva.

Pri praktiko, de Maŭ zedong. (2a eld.) Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 26 p. 15 × 10 cm. 0,40 gld.*

Eklezio kaj milito, de P. Jacques Goettmann. Eld. Ekumena Esperanto, Svislando, 1967. 40 p. 18 × 12 cm.* 1,75 gld.

(daŭrigo sur sekvanta paĝo)

MAGNETOFONA SERVO DE UEA NOVAJ PROGRAMOJ MENDEBLAJ

La sonbendaj programoj ĉi-sube listigitaj estas nun mendeblaj ĉe la Magnetofona Servo, s-ro R. Eichholz, 2427 Padstow Crescent, Clarkson, Ontario, Kanado. Informoj pri la Servo aperas en la Jarlibro 1967, Unua Parto, p. 107-109. Por ricevi kompletan liston de la disponeblaj programoj (broŝuro 16-paĝa) oni sendu internacian respondkuponon al la Centra Oficejo de UEA aŭ al la adreso de la Magnetofona Servo.

208. 'Für und wider Esperanto'. Germanlingva radio-diskuto kun d-ro W. Bormann, H. Harrasin, prof. F. Schulze en Südwestfunk, UKW II je la 8.6.65 30
209. Prof. E. Privat: Festparolado dum la Svisa Esp.-Kongreso en Biel-Bienne, 14.3.59 (pri Zamenhof) 33
210. Prof. E. Privat: Francilingva parolado pri Esperanto kaj Zamenhof 50
211. D-ro J. Lieberman, d-ro John White: 'Esperanto versus Basic English' (Publika anglalingva diskuto) 83
- La 51-a Universala Kongreso de Esperanto**
212. Solena Inaŭguro (nur parte, sen la festparolado de prof. Lapenna) 75
213. 1-a Ĝenerala Kunveno de UEA (Esp. en la fakoj) 160
214. 2-a Ĝenerala Kunveno de UEA (Diskuto pri la estrara raporto, raportoj de fakaj asocioj) 138
215. 1-a Kunveno de la Komitato de UEA . 200
216. 2-a Kunveno de la Komitato 135
217. 3-a Kunveno de la Komitato 180
218. Oratora Konkurso 55
219. Belarta Konkurso. (Deklamas G. Waringhien, E. Lapenna, E. Urbanová, L. Tárkony, J. Baghy, K. Kalocsay) . 70
220. D-ro Sadler legas la inaŭguran paroladon de prof. Bárczi por la 19-a sesio de la Internacia Somera Universitato 20
221. Prof. d-ro Ivo Lapenna: 'Protekto de aŭtoraj rajtoj' 60

222. Prof. G. Waringhien: 'La Budapeŝta skolo' 50
223. D-ro Aŝvinikumar: 'Metriko kaj deklarmarto en la hindia lingvo' 85
224. Jadwiga Gibczyńska prezentas du monologojn: 'La eta princo' kaj 'Vojaĝo al verdaj ombroj' 60
225. Andor Gauder: 'La hungara lingvo' (Prelego dum la hungara posttagmezo) 45
226. Buŝa parto, Internacia Ekzameno . . 80
227. Publika kunveno de Internacia Scienca Asocio Esperantista 90
228. Kunveno de Skolta Esperantista Ligo 38
229. Kunveno de la Internacia Instituto por Oficialigo de Esp. 105
230. Fermo de la 51-a UK 78
231. R. Haupenthal: 'Enkonduko en la libroskiencon de Esperanto'. (Prelego dum studsemajno en Rinteln, Germanujo, 1967) 110
232. R. Haupenthal: 'La Bulonja Zamenhofa Parolado' (Prelego en Rinteln) 50
233. R. Haupenthal: 'La lasta Manuskripto de d-ro L. L. Zamenhof.' (Teksto en 'esperanto', aprilo 67). (Prelego en Rinteln) 30
234. R. Haupenthal: 'La partopreno de Zamenhof en la cionisma movado.' (Prelego en Rinteln) 24
235. R. Haupenthal: 'La Fundamenta Krestomatio'. (Prelego en Rinteln) 45
236. D-ro Bormann: 'Esperanto el la vidpunkto de universitata instruisto.' (Pri la sinteno de universitataj instancoj al Esperanto) - (Prelego en Rinteln) . . 60

RICEVITAJ ELDONAĴOJ (daŭrigo)

Gram Muzilo/Mi ludas Muzilon, de P. H. Paruzel. Eld. Muzilo, Dordrecht, Nederlando (1967). 110 p. 29 × 21 cm., 5057 ekz. Dulingva eld. pola-Esperanta.*

La voĉalbumo de Esperanto. (1) Prof. D-ro Ivo Lapenna, (2) S-ino Ljuba Knjažinskaja-Lapenna. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, (1967). Fleksebla disko 33 r/m., 17 cm. diam., duflanka.*

Bukedo da poezio kaj Eta krozo tra la Esperanta literaturo, antologietoj. Eld. Bristola Esperanto-Soc., 1960. 13, 14 p. resp., 25 × 20 cm., multobl. Mendeblaj ĉe Reto Rossetti, 120 Cromwell Road, Bristol 6, Britujo. Po 2 steloj.

Freŝa mateno, romano de Reuven Kritz. El la hebrea tr. Ota Ginz. Eld. Libroj "PURA", Israelo, 1967. 280 p. 18 × 11 cm., ilus., bd., 6,— gld.*

The Nixon Esperanto Vocabulary. 3-a eld., SBET, Londono, 1967. 195 p. 14 × 8 cm. 2,— gld.* Vortareto angla-Esp., Esp.-angla.

Tuja Esperanto. Eld. Esperanto Services, 85 Sparks St., Ottawa 4, Kanado, 1967. 12 p. 17 × 10 cm. Enkonduka lernilo, angla-franca.

Junul-kurso. Prononcekzemploj. Eld. SAT-Amikaro, Paris (1967). Serio de 5 diskoj flekseblaj, 33 r/m, 18 cm diam., duflankaj. Akompanas la lernolibron "Junul-kurso".*



ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la juli-aŭgustan eldonon.

SVISA RADIO. La lunda kaj merkreda elsendoj nun komenciĝas kvin minutojn pli malfrue, je 12.05; samaj ondlongoj.

RADIO ROMA. 3-IX, La vulkano Etno; 10-IX, Tra la literaturo; 17-IX, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-IX, Leterkesto; 1-X, La 38-a Itala Kongreso de Esperanto; 8-X, La itala verkisto Luigi Pirandello; 15-X, Laŭlonge de la rivero Mincio; 22-X, La itala pentristo Masaccio; 29-X, Kristana mondo. La dua parto de ĉiu disendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro Luigi Minnaja.

DELEGITOJ-GASTIGANTOJ

Sekve al propono de la fakdelegito por turismo en Londono, la Estraro de UEA decidis, ke tiuj delegitoj aŭ fakdelegitoj, kiuj estas pretaj gastigi vizitantojn, eventuale kontraŭ malgranda pago, povas tion anonci en la Jarlibro, Unua Parto, ĉe la koncerna enskribo en la adresaro de Delegitoj. Ekzemple jene: FD (Turismo): Philip Buttinger, instruisto, 3 Dafforne Rd., London, S.W. 17; tel. (01) 672 8969. (Tranokto kun matenmanĝo: 10 steloj).

NOVA ĈEFDELEGITO

Svisujo: S-ro Kurt Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco; tel. 092-5.48.78.

NOVAJ DELEGITOJ

Antiloj (Asociaj Statoj)

Roseau (Dominica) 14 000. D, FD (Fotografio) & FD (Turismo): Alex Homell, reprezentanto, Poste Restante, G.P.O. (Validas de 1 sept. ĝis 31 majo ĉiujare).

Aŭstralio

Brisbane. FD (Turismo): la FD (Komerco).

Brazilo

Brasília. FD (Edukado): Evaristo Manoel Pereira, instruisto, SQS 304, bloco K, ap. 104; tel. 2-6653.

Vitória. FD (Edukado) & (Lingvoj: portugala): José Paulino Alves, ĵugisto, Rua Joaquim Lírio 36; tel. 7-0175.

Britujo

Beverley (Yorks.) 25 000. D: D-rino Marjorie Flint, bioĥemiistino, 151 Coltman Avenue; tel. 884923.

Bradford. D: la antaŭa VD. VD: Audrey B. Duerden, oficistino, 1 Grove House Drive, Bradford 2; tel. 639888.

Dewsbury (Yorks.) 55 000. D: Arthur Jackson, sekretario, 35 Boothroyd Green.

London. FD (Klimatizo, varmigado): Charles H. S. Donald, inĝeniero, 89 Bramley Road, Ealing, W. 5; tel. 01-567-5561.

Sheffield. FD (Edukado): la D.

Worcester. 67 000. D: Leonard Simpson, poŝt-oficisto, 1 Vine St.; tel. 26050.

Francujo

F-93-Bagnolet (Seine-Saint-Denis). 32 000.

FD (Edukado: pedagogio moderna): Jean Marin, prof. pri natursciencoj, 91 Avenue de la Dhuys; tel. 287-64-45.

F-26-Bourg-de-Péage (Drôme) 9 000. D: Maurice Reynaud, instruisto, 14 Rue Marx Dormoy.

F-63-Fontaines sur Saône (Rhône) 8 000. D & FD (P.T.T.): Pierre Dehan, poŝtejestro, 56 Rue Gambetta; tel. (78) 47-04-06 (Lyon).

Germanujo

D-5769 Stockum (Sauerland-Westfalen) 1000.

D: Josef König, pensiito, Esperanto-Strasse 4.

Hispanujo

Manlleu. FD (Filatelo) & (Mekaniko): Ernesto Soler, mekanikisto, Generalísimo 18.

Hungarujo

Budapest. JD: Gábor Farkas, studento, XIV. Emilia str. 23; tel. 630-276.

Székesfehérvár. FD (Sonbend-Amatorado):

Tibor Tolnai, elektroinĝeniero, Karinthy utca 8 (Szivárvány-telep).

Italujo

Chieti. 50 000. D & FD (Industrio) & (Lingvoj): Giorgio Bronzetti, oficisto, Via Madonna degli Angeli 179.

Japanujo

Toyonaka. FD (Farmacio) & (Rotario): la D.

Norvegujo

Kristiansund N. FD (Religio) & (Skoltismo):

Hans Amund Rosbach, paroĥestro, Nergata 37 C.

Svisujo

CH-3550 Langnau (Emmental) 6 000. D & FD (Fervojo), (Kontraŭ-alkoholismo) & (Stenografio): Erwin Hans Zuber, subĉefo, stacidomo; tel. 035-21820 (deĵorejo).

NE PLU VALIDAS

Aŭstrujo. Aflenz-Kurort, Graz: D & FD (Religio). Wiener Neustadt: D.

Aŭstralio. Canberra: D.

Britujo. Bradford: D (Carter).

Finnlando. Helsinki: VD (Helsinki 63), FD (Urba).

Francujo. Asnières: D & FD (Fervojo). Bourgl-Reine, Clermont-Fd: D. Saumur, Strasbourg: FD (Dogano).

Germanujo. Frankfurt: FD (Elektrotekniko).

Hamburg: FD (Instruado: Esp.). München: JD.

Hispanujo. Saldaña.

Italujo. Udine: FD (Esp.-instruado).

Kanado. Montreal: D.

Nederlando. Leeuwarden: VD, FD (Instruado), FD (Turismo).

Norvegujo. Folldal, Kristiansund N.: VD.

Nov-Zelando. Lyttelton.

Portugalujo. Meda.

Svedujo. Höganäs: D, FD (Kontraŭalk.). Malmö: FD (Mondfederalismo). Tuna-Hästberg.

Svisujo. Konolfingen.

Usono. Berkeley. Ogden.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Kańczyk, s-ro P. M., Bytom, Polujo.

Król, s-ino T., Gliwice, Polujo.

Paruzel, sac. Henriko, Piekary Śląskie, Pol.

Pawlicki, s-ro A. J., Bytom, Polujo.

Roth, s-ro Rolf, 6741 Burrweiler, Germanujo.

Sunde, s-ro P., Oratia, Nov-Zelando.

Wisniewski, s-ro M., Zabrze, Polujo.

Woerden-van der Graaf, s-ino T. van, Nederl.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1967

281 Klumair, s-ro Karl, Aŭstrujo. 282 Degryse, A., Belgujo. 283 Azevedo, s-ro Mauro Gomes, 284 Braga, s-ro I. Gomes, Brazilo. 285 Lyes, s-ro N. A. H., Britujo. 286 Teukku, s-ro Tuomo, Finnlando. 287 Choi, s-ro Bong-Yeol, 288 Kim, s-ro Won-Kyong, 289 Rhie, s-ro Dae-Young, Koreujo. 290 Colliander, Martha, 291 Ekman, s-ro K. G. A., 292 Frithiofson, s-ro Tage, 293 Håkansson, s-ro H., 294 Johansson, s-ro Nils,

oficiala informilo
n-ro 404, 1 aŭg. '67

esperanto
septembro 1967

295 Kinnander, s-ro Stig, 296 Lindberg, s-ro Fritiof, 297 Lindström, s-ro Bror, 298 Lokna, s-ro J., 299 Sedendahl, s-ro W., Svedujo. 300 Ledeen, s-ro H., 301 Thomson, s-ro Ken, Usono.

DONACIOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Aŭstrujo: Rentmeister, s-ro F. W., 1,20. Francujo: MacMilan, s-ro, 7,02. Germanujo: Hausner, s-ro L., 9,—; Hölzgen, s-ro F., 4,50; Krauss, s-ro F., 6,30. Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 72,75. Svedujo: Bohman, s-ino Magda, 998,75; Forslund, s-ro Y., 4,50; Homell, s-ro Alex, 6,94. Sud-Afriko: Jong, s-ro H. de, 4,75.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Nederlando: Beek Kelly, s-ino v. d.: 500,— gld.
Sumo entute ricevita: 26 036,32 gld.
Sumo elspezita: 25 851,54 gld.
Saldo pozitiva: 184,78 gld.

FONDAJO CANUTO

Germanujo: Glöckner, s-ro P., 1 J-MA. Italujo: Dato, s-ro L., 1 J-MJ. Nederlando: N.N., 4 MA. Rumanujo: Welther, ing. L. R., 1 MJ.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino, C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

stato je la 24-a de julio 1967

Konkurso I

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	Francujo	7752	6551	84,51
2. (9)	Belgujo	2055	1725	83,94
3. (2)	Nederlando	5975	4966	83,11
4. (3)	Britujo	6691	5357	80,06
5. (4)	Usono	4526	3585	79,21
6. (14)	Germanujo	7221	5710	79,07
7. (5)	Hispanujo	3250	2425	74,62
8. (6)	Finnlando	3160	2275	71,99
9. (7)	Svedujo	7180	5045	70,26
10. (11)	Svislando	2459	1550	63,03
11. (8)	Italujo	4220	2590	61,37
12. (10)	Danlando	3099	1760	56,79
13. (12)	Brazilo	3856	2109	54,69
14. (13)	Japanujo	3965	2070	52,21
15.	Jugoslavio	5375	1740	32,37

Konkurso II

1. (2)	Kanado	1124	1230	109,43
2. (1)	Islando	250	240	96,—
3.	Aŭstrujo	1475	1245	84,41
4.	Aŭstralio	1475	1204	81,63
5.	Nov-Zelando	1481	1048	70,76
6. (7)	Sudafriko	260	170	65,38
7. (6)	Israelo	595	365	61,34
8. (11)	Grekujo	270	165	61,11
9. (10)	Norvegujo	1755	1060	60,40
10. (9)	Madagaskaro	250	143	57,20
11. (8)	Argentino	905	510	56,35

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

ANONCETOJ

Universala Revuo (Legajoj por ĉiuj) entenas la Adresaron "Esperanto-Parolata", plej utila por parole uzi la interlingvon (Jarlibro, paĝo 126).

Letervespero okazos en decembro (15 lernantinoj). Sendu bildkartojn bele afrankitajn, ni respondos. Centre Culturel Zamenhof, 8 Boulevard Néhou, 27-Les Andelys, Francujo.

Pasporto - Oficiala TEJO-Programo. Peresperanta Internacia Hominterŝanĝo por individuoj kaj familioj. Partoprenu kiel gastiganto. Informojn laŭ la regularo: Rubén Feldman González, Oroño 866 "A", Rosario, Argentino.

Por stimuli gravan trafikagentejon en Britujo uzi Esperanton mi bezonas informojn pri la efikeco de jam eldonitaj turismaj informiloj en Esperanto. Delegitoj kaj aliaj bonvole skribu pri tio al "Hodopo", ĉe Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W. 11, Anglujo.

Nova adreso f-ino enid Wekker: Ottho Heldringstraat 6, Amsterdam, Nederlando.

Mi serĉas: Lingvo Internacia, n-ro 201 (= sept. 1910); La Revuo, n-ro 22. Ofertojn al: Reinhard Haupenthal, 6603 Sulzbach, Am Bahndamm 12, Germanujo.

Salutu la 33-an Nov-Zelandon Kongreson, 8-12 jan 68! Adreso: F. E. Wood, 24 Stewart Road, Auckland 3.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Prof. Manuel Fernández Menéndez bedaŭras ne povi persone respondi, kaj korsalutas kaj dankas multajn gesamideanojn, kiuj sendis gratulojn pro verko "La homo sur sia vojo".

Ĉu vi estas preta korespondi en Esperanto kiel "onkl(in)o" kun alilanda infano? Skribu al: s-ro J. H. Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston (Manchester), Britujo.

Por sukcesi kaj feliĉadi jen via gvidilo: "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10%.

LAVESPA, kiu estas mondmovado al invalidoj kaj handikapuloj, deziras kontakti geamikojn de tuta mondo. Skribu al s-ro Manuel M. Heidun, Vestergade 53, Strib. Danlando.

La Poŝtmark-kolektado daŭras. Propono: sendu poŝtfreŝajn seriojn de via lando. Tiaj ofte havas pli da valoro, ol tio, kion vi mem pagis por ili. Sendu daŭre al Peter Zacho (por UEA), Amosevej 5 A, Kopenhago Brh., Danlando.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

MENDU LA BINDITAJN KOLEKTOJN DE

MONDA KULTURO

Bela kaj fortika, dukolora bindo kun ora surpreso. Poezio, noveloj, priartaj artikoloj, ĉiam legindaj. Tre konvenaj kiel donacoj, ĉu unuope, ĉu kune.

Vol. 1 (1962-64), 288 + 36 p., 27 × 19 cm.

Vol. 2 (1965-66), 168 + 24 p., 30 × 21 cm.

Prezoj: ĉiu volumo po 19,— gld.
plus sendokostoj 10%

GRUPFOTOJ 52-A UK ROTTERDAM

De la komunaj fotoj faritaj en De Doelen tuj post la Solena Inaŭguro restis kelkaj ekzempleroj. La du fotoj montras respektive la dekstran kaj maldekstran partojn de la salono kaj kune prezentas la tutan kongresanaron. Prezoj: po 2,— gld.; ambaŭ fotoj kune 3,50 gld. Mendu ĉe UEA.

Aŭtunaj Feriaj Kursoj

15. - 21. de okt. en Århus, Danlando, invitas vin veni por ĉeesti. Belega altlernejo en interesa loko. Prospekton sendas senpage al vi

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Åbyhøj, Danlando.

LINGVOLOGIA REVUO

Esperantlingva fakeldonaĵo por lingvologio, la ekzakta lingvoscienco kalkuleca. La kvara numero aperis. Specimenoj haveblaj senpage malal la eldonanto kaj redaktoro Emil Haniemi, P.O. Box 764, Ingham, 4850-N-Queensland, Aŭstralio.

Lingvologio - la nova lingvoscienco ekzakta.

DU OFICIST(IN)OJ SERĈATAJ POR LA CENTRA OFICEJO DE U.E.A.


bone regantaj Esperanton parole kaj skribe.

Unu kun fakaj scioj kaj kvalifikaĵoj pri librotenado, kapabla memstare gvidi tiun fakon;

dua por redaktado de la jarlibro kaj por diversaj aliaj oficejaj laboroj.

Leteroj kun informoj pri instruiteco, diplomoj, antaŭaj oficoj, aĝo, rekomendoj ktp. al la Direktorino de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam.

LA NAŬZO



broŝ.
11,70 gld.
46,80 st.

222 p.
15 × 21

Eksterordinara romano de
Jean-Paul Sartre
en traduko de Roger Bernard

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-1
Eldono de UEA

KIAL NE ?

La Inteligenta Esperanto-Gazeto
por modernaj gejunuloj.

LEGINDA
PENSIGA
SATIREMA

Unuvorte — la sola gazeto
por raciaj homoj.
Jarkotizo = 20 steloj/10 ŝilingoj.

'Kial Ne ?'
2, Edwina Gardens,
Redbridge, Ilford,
Essex, Anglujo.

Ole Ramby:

Novajo !

NATURA NUTRADO

Jus aperis tiu 14-paĝa broŝuro tradukita el la
dana de **Betty Larsen**. Kun bele ilustrita
kovrilo.

Natura nutrado estas rimedo por regenerado
de la organismo. Ĝi helpas konservi vian sanon.

La broŝuro kostas \$ 0.25 (Fr.Fr. 1.20) aŭ ekviva-
lento.

Ĉe SAT, 67 av. Gambetta, Paris-20 (poŝtkonto
1234.22 Paris) aŭ ĉe via Libroservo.

BINDITA JARKOLEKTO

de la revuo "Esperanto", 1966:
204 + 44 paĝoj, 136 ilustraĵoj.

Bela volumo bindita en verda tolo kun ora
surpreso.

Por Membroj-Abonantoj 1966: 7,— gld.
Por aliaj mendantoj: 14,— gld.

ESPERANTO

estas la plej internacia Esperanto-revuo en la
mondo, kun legantoj en ĉ. 80 landoj

ESPERANTO

estas via revuo kaj dependas de via apogo

Diskonigu ĝin ! Varbu por ĝi
abonantojn (18,75 gld. jare) kaj
Membrojn-Abonantojn (25,— gld. jare)

Petu kvanton da aboniloj de la Centra Oficejo
de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2,
Nederlando

Sec, ^{0*} pecimenan ekzempleron al viaj amikoj
ne-abonantoj

La ĉie ŝatata rektametoda lernolibro

PRIVILEGIA VOJO

al lingvoscio: Esperanto

Jam 16 500 ekzempleroj presitaj de la
internacia kaj naciaj eldonoj! Bone
uzebla tiel por kursoj kiel por mem-
lernantoj. Instruas ĉiujn novajn vor-
tojn per simboloj, ilustraĵoj aŭ per
jam lernitaj vortoj; kontinua teksto.

Mendebila kun instrukcioj en angla,
araba, dana, franca, germana, hebrea,
hispana, itala, japana, nederlanda,
norvega, portugala kaj Esperanto, laŭ
elekto.

Prezo: 13 steloj (3.25 gld.) plus afranko. Sola
vendrajto ekster Skandinavio: UEA.

LERNOLIBRO POR LA TUTA MONDO